XXVIII-a Jaro. — N° 382-83 (6/7). Monata Junio-Julio 1932.

ESPERANTO

Internacia Revuo eldonata de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER. — Redaktoro : D-ro Edmond PRIVAT. — Direktoro de UEA : Hans JAKOB.
Adreso de la Redakcio kaj Administracio : 1, Rue de la Tour de l'Ile, Genève.

ENHAVO : Pacaj herooj, de Edmond Privat (101). — Impresoj el Hindujo (102). — Pacarmeo Senarma (102). — Virino ne komprenata (103). — Notoj (104). — Albert Thomas (104). — Tra la libraro (105). — Bildkarto de Svedlando. — Sveda gimnastiko (108. — Por helpi al UEA (108). — Pri la atakoj de S-ro Onnen (109). — Universala Esperanto-Asocio : Oficiala informilo n-ro 19 (110). — La voĉo de dankado (111). — Venu Parizon (112). — Publika letero al S-ro Onnen en Hago (113). — Naciaj kongresoj (114). — Zamenhofa strato en Barcelona (115). — Memorŝtono en Olomouc (115). — Kronikajoj (115). — Bildkarto de Svedlando (116). — Internacia Polica Ligo, oficiala informilo (117). — Kie restas la Jarlibro 1932 ? (118). — Cseh Instituto (118). — Karavanoj (118). — Esperantista vivo (120). — Niaj mortintoj (119). — Korespondado. — Petoj kaj Proponoj (119). — Reklamoj (120). — Aldono : Bulteno de la Internacia Labora Oficejo, Majo-Junio, N-ro 48.

Pacaj herooj

En Ĝenevo sidas la fama konferenco pri malpliigo de l'armiloj. En unu komisiono militaj spertuloj diskutas kiamaniere konservi maksimumon al sia regno kaj minimumon al la najbara. Tio nomiĝas materia senarmigo.

En alia komisiono diplomatoj esploras kiamaniere forigi ĉe la nekonferencanoj tiun malfavoran atmosferon, kiu regas en ilia propra kunveno. Tio nomiĝas spirita senarmigo.

Pesimisto asertas ke la dua komisiono celas kovri per belaj rezolucioj la malsukceson de la unua. Ke li malpravu ni ĉiuj deziras.

Tio ne signifas, ke nenio estas farinda rilate al la intelekta flanko de senarmigo. Multaj homoj tro facile rezignas kaj perdas ĉian kuraĝon en tiuj momentoj, kiam ondo de perforto subite altiĝas antaŭ iliaj okuloj.

La eco mem de l'ondoj estas altiĝi kaj malaltiĝi vice. Bona ŝipo, scianta kien ĝi veturas, trankvile daŭrigas la vojaĝon. Tion faris UEA dum la mondmilito, kiam ondego pereigis fidon, monon, amikojn, esperon kaj minacis ĉion. Same ĝi agos nun.

Esperanto vivos kaj progresos pluen. La homaro ĝin bezonas. Egale ĝi bezonas spiritan pretigon al pli bona epoko bazota sur aliaj rimedoj ol perforto.

Unu el la kaŭzoj de tiuj minacaj ondoj estas edukado de l'infanoj. Ili ŝatas aventurojn. Ili legas avide pri la vivo de l'famaj homoj. Bedaŭrinde la ĉefa literaturo kaj instruado sur tiu kampo rilatas nur al militistoj.

Tamen ekzistas en historio aliaj ekzemploj de kuraĝo kaj energio. Gejunuloj povas entuziasmiĝi tiom fervore pri Pasteur aŭ Nansen, kiom pri Napoleono. Nur mankas ofte la materialo pri la pacaj herooj, ĉar la tutan lokon okupis ĝis nun la militaj.

En diversaj landoj oni reagas. Aperas noveloj montrantaj la militon sub pli malgajiga lumo, tia, kia ĝi estas reale. Sed ekzistas ankoraŭ antaŭjuĝoj kontraŭ tiaj libroj. Nediskuteblaj ekzemploj de braveco brilas en ĉiu milito super la teruraj kruelaĵoj kaj barbaraĵoj. Parto de la publika opinio protestas tuj, kiam oni emas ilin ignori.

Tial instruistoj estas ne ĉie liberaj tiurilate. Pli facile, ankaŭ eble pli efike, ili povas semi pozitivajn pensojn anstataŭ negativajn. Intereso pri grandaj herooj pacaj povas fariĝi unuanima kaj senofende sukcesa.

Ni bonvenigu la novajn plutarkojn diversnaciajn, kiuj verkas por junularo pri vivoj de San Francisko el Asizi, Livingstone aŭ aliaj bravuloj pacemaj. Beethoven brave batalanta malgraŭ sufero kaj surdeco, por doni al la homaro la mirindan konsolon de sia muziko, Matilde Wrede serĉanta la plej terurajn krimulojn en la malliberejoj por ilin amikigi, Pestalozzi baraktanta kontraŭ mizero por eduki la orfojn de l'granda mondmilito en tempo Napoleona, jen belaj ĉapitroj en nova franca legolibro de Alice Descœudres titolita « Herooj ». (Ĉe : Imprimeries Populaires, La Chaux-de-Fonds, Svis., Prezo 1 Frk. svisa).

Tiaj aŭtoroj faras utilan laboron. Ili ne forgesu resumi ankaŭ la vivon de tiu granda heroo paca, kies nomo estis Zamenhof. La infanoj ŝatas aŭdi pri lia persisto.

Edmond Privat.

La nuna numero estas por Junio-Julio. La venonta aperos je la fino de monato Aŭgusto kaj enhavos raporton pri la 24-a Universala Kongreso de Esperanto.

Okcidento kaj Oriento

Impresoj el Hindujo

Birdoj sur bovinoj

Amu la bestojn, se vi veturas al Hindujo. Ĝi necesas por esti feliĉa tie. Ĉarmaj sciuroj ĉirkaŭas vin. En ĝardenoj ili svarmas, kuras al tegmentoj, saltas al arboj, kaj venas sur vian ŝultron iom same kiel en la Novjorka parko, fama pro tio.

Vespere sur muro de via dormoĉambro flavaj salamandroj alrigardas vin per nigraj okuloj tute senmalicaj. En la banĉambro, pli ĝuste lavejo, trankvila bufo sidas en angulo kaj amike profitas el via ŝprucado de varma kaj malvarma akvo el brilaj bronzaj ujoj.

Teretaĝoj estas vivoplenaj kaj pentrindaj. Unu vesperon en Subarmati, filo de Gandhi venis pruntepreni mian lampon olean por ion serĉi ekstere en la ĝardeno. Li forgesis fermi la pordon. Tri minutojn poste mi aŭdis iun en la ĉambro palpanta korbojn apud la fenestro kaj ĉifanta paperojn. « Kiu estas ĉi tie » ? mi ekkriis. Nenia respondo. « Hallo ! Hallo ! kiu estas ? » Neniu respondis, sed altkreska simio eliris silente kaj seniluziite.

Tiuj belaj simioj grizaj estas altaj kiel dektrijara knabo. Multajn oni renkontas apud Ahmedabad. Vi kredas ekvidi grandan hundon sur la vojo... subite ĝi saltas al arbo kaj supren al familio de kunuloj. Ĉiuj observas vin de sia branĉo, sed ne haltas mordeti berojn kaj ĵeti al vi la restaĵojn.

En Delhi, la ĉefurbo de Hindujo, la simioj estas multe pli malgrandaj. Amase ili kuradas sur tegmentoj kvazaŭ katoj en Eŭropo. Necesas almeti ferajn barilojn al fenestroj, se vi deziras vivi solece tie.

Inter si la bestoj reciproke helpas unu la alian. Virbovoj kaj bovinoj sur kamparo kuŝas aŭ staras ofte kun nigra birdo sur la dorso. La etulo helpas la egulon per forigo de insektoj. Paca vidaĵo !

Tiuj bovoj blankaj aŭ brunaj, kun ĝibo ĉe la kolo, aldonas grandan ĉarmon al la hinda pejzaĝo. En urboj ili sidas en pentrinda maniero sur la trotuaroj, eĉ sur la stratoj aŭ promenas trankvile inter amasoj homaj. Jen unu, tre malgrasa, ĉe angulo de strateto. Per lango rapida ĝi forŝtelis platan kuketon el tritiko, ĵus rostitan de vendisto subĉiela. Ĉiuj ekridas en ĉirkaŭaj butikoj.

La bubaloj estas nigraj kaj pezaj, multe pli dikaj ol bovoj, kun kornoj refalditaj malantaŭen iom eĉ malsupren. Iliaj kapoj foje elstaras el lagoj aŭ riveroj, kie la tuta brutaro ripozas en freŝo.

En la nordaj urboj, sub altaj pordegoj, fiere paŝas kameloj. Pezajn sakojn ili portas aŭ strangajn veturilojn tiras kun lignaj bariloj kvazaŭ kubajn kaĝojn.

En tiu lando de vegetaranoj la bestoj malpli timas la homojn. Regas ia konsento, eĉ amikeco senvorta. Mi aludas nek pri tigroj, vivantaj en arbaro nek pri serpentoj ne pli oftaj ol vipuroj okcidente. Nur unu liberan Kobron mi vidis. Kamparano ĵus estis ĝin forsendinta post forigo de ĝiaj du venenaj dentoj.

Vulturoj funkcias kiel urbaj purigistoj. Pli multnombraj ili estas ol korvoj en Eŭropo. Amasoj da ili rondflugas aŭ sidas sur la ĉirkaŭurbaj terenoj. Iuj estas nigraj aŭ brunaj kun senkarna kolo kaj longa beko pintkurva. Aliaj estas blankaj kvazaŭ grandaj anseroj kun beko flava kaj kokforma. Tutaj aroj atendadas ĉe riverbordoj kune kun ardeoj sur unu kruro starantaj.

Eĉ formikoj utilas kaj senhalte procesias en la necesejoj, kiujn ili purigas tage kaj nokte. La okulojn plezurigas liberaj pavoj, disradiantaj sian plumaron ĉe rando de l'arbaroj, bluaj birdoj, verdaj papagoj, flugantaj de branĉo al branĉo kaj briligantaj sub brila suno sian mirindan koloron.

Dume sennombraj armeoj da griloj kaj cikadoj plenigas varman aeron per arda kantado.

Edmond Privat.

Socia Vivo

Pacarmeo Senarma

La ĉino-japana konflikto kaŭzis en Eŭropo tre interesan iniciaton. Antaŭ kelkaj monatoj angla gazetaro presigis alvokon subskribitan de D-ro Sheppard, D-rino Maude Royden kaj Herbert Gray. Ili proponis, ke volontuloj ambaŭseksaj akceptu stari senarme inter la batalantoj en Orienta Azio por ĉesigi la militon tie.

Alvenis 800 respondoj sinoferaj. La kialo de tiu propono estis la jena : Multaj homoj en Eŭropo esprimis opinion, ke la Ligo de Nacioj devas esti preta eĉ agi milite por trudi pacon. Konsciencaj pacemuloj havas konvinkojn, laŭ kiuj ili neniel povus partopreni en tia milito, eĉ por haltigi batalon. Tamen ili sentis ke militrifuzo ne sufiĉas. Ion ili faru.

Tial ili proponis aĉeti pacon je kosto de sia vivo. Kompreneble la malfacilaĵoj estas grandegaj. Eĉ atingi la lokon de la bataloj ili tute ne povus sen la kunlaboro de la Ligo de Nacioj aŭ registaroj.

Pro tio ili sin turnis al la Ligo, kies ĝenerala sekretario respondis, ke li tute ne konsideras la ideon kiel fantazian, sed ke ĉiu ajn propono devas elveni de iu el la regnoj, kiuj estas anoj de la Ligo. Tiam ili sin turnis al la angla registaro, kiu promesis ekzameni la proponon.

Gazetoj kontraŭdiris opiniante, ke neniu registaro povus konsenti je sendo de regnanoj al preskaŭ certa morto. La proponintoj respondis, ke jam de jarcentoj la registaroj sendadas civitanojn al certa morto eĉ milionope kaj punas per malliberigo aŭ mortigo tiujn, kiuj rifuzas iri. Estus ja strange se oni malpermesus al ili oferi siajn vivojn por paco, dum oni devigas al la samo por milito !

Multaj bonvolaj homoj estas serioze maltrankvilaj pri la konstanta malsukceso de oficialaj klopodoj pri senarmigo kaj paco. Antaŭ iom da tempo S-ro Lloyd George, iama ĉefministro brita, konstatis, ke oni senĉese konferencadis dum dek jaroj kaj finis ĉiun konferencon per mirindaj interkonsentoj kaj plena harmonio pri neceso de senarmigo kaj malaltigo de landlimaj dogantarifoj, sed ĉiam sub kondiĉo, ke la najbaro komencu !

Tiuj konscienculoj, kiuj deziras ion fari praktike, ne volas rezigni al nura ironio pri tiu danĝera situacio. Ili serĉas rimedon je rekta laboro, eĉ tuja sinofero. Ke pli ol okcent personoj respondis al tiel postulema alvoko, tio montras, ke paco de nun havas pretajn heroojn.

Intertempe la cirkonstancoj evoluis en Orienta Azio kaj ŝajnas, ke la propono ne realiĝos tie. Tamen la iniciatintoj ne deziras halti kaj intencas organizi definitive sian pacarmeon por eventualaj okazoj ie ajn.

Ili ekrilatis kun Pierre Cérésole kaj liaj taĉmentoj de volontuloj por internacia helpservo. Pri tiu laboro por helpi eksterlandajn vilaĝojn ruinigitajn pro katastrofoj ni plurfoje atentigis niajn legantojn sub titolo « Fosilo anstataŭ pafilo ».

Nun ambaŭ organizoj kunlaboros por starigo de pacarmeo, en kies rangoj enskribiĝos laŭ geografiaj dividoj, 1-e personoj pretaj stari senarme inter batalantoj en milito, 2-e personoj pretaj fari konstruan servon pacigan ĉiufoje kiam ĝi estos bezonata, kaj personoj pretaj helpi tiujn, kiuj povos iri.

Kompreneble la volontuloj devos submetiĝi al necesa disciplino por certigi la sukceson de la organizo. Ankaŭ ili devos rezigni je la rajto pri venĝo de ilia registaro kontraŭ alia en okazo de morto. Venĝo difektus la tutan aferon kaj plene malakordiĝus kun la motivo inspirinta la iniciaton.

Generalo Crozier, kiu verkis anglan libron kontraŭ milito, helpas nun la organizantojn, kies centra oficejo sidas en London N W 3, Hampstead, 1 Willoughby Road, kie mono kaj enskriboj estas danke akceptataj.

En tempo kiam homoj organiziĝas en ĉiuj flankoj por uzo de perforto kiel rimedo al siaj celoj, estas refreŝige aŭdi pri ekzisto de bravuloj pretaj oferi sian vivon por ĉesigo de tiu sanga metodo.

P.

Literaturo

Virino ne komprenata

de ALBERT JEAN.

Kun antipatio Cécile Vernier rigardis sian edzon, kiu, apogante la kubutojn sur la tablon, lerte per tranĉilo dispartigis rostitan blankfiŝeton.

Sentante la mutan riproĉon de Cécile, Raymond demandis:

« Nu, kio do denove ? »

« Pli ol centfoje mi jam diris al vi, ke edukita homo ne dispartigas fiŝojn per la tranĉilo. »

Raymond ekskuis siajn ŝultrojn.

« Vi jam malhelpis min, dispremi fragojn en lakto kaj verŝi vinon en la buljonon. Finfine mi ne estas princo. »

« Bedaŭrinde » ĝemis Cécile, kaj kapjesis malĝoje.

La maldelikateco de la viro ofendis kaj naŭzis ŝin. Ironte al la manĝtablo, Raymond kun plezuro demetis la kolumon. Dum la somero li vivis hejme senjake, piĵamaon li ne konis. Post la manĝo li akrigadis alumeton, por purigi la dentojn antaŭ ol li ekbruligis la pipon. Kaj sen ia ĝeno li estus trinkinta kafon el la sama flava glaso, el kiu li ĵus sorbis la lastan guton de forta ruĝa vino.

Cécile kontraŭe pleje ŝategis elegantan manieron. Prizorgante la hejmon, ŝi surmetadis kaŭĉukajn gantojn, ŝia malgrasa malgranda fingro krute elstaris, kiam ŝi trinkis; ĉiumatene ŝi legis la « *Chronique Mondaine* » de la gazeto, kaj la rangulojn ŝi nepre admiris kaj respektegis.

Pro tio la najbaroj ŝin tre malŝate kritikis. Oni juĝis ŝin aroganta, ne komprenante la kaŭzon de ŝia stranga konduto kaj izoleco.

Ofte la junulino posttagmeze kiam ŝi estis enviciginta la vazaron kaj ĉion reordiginta, senmove sidadis ĉe la fenestro. Lace metinte la manojn sur la genuojn, ŝi fermadis la okulojn. Ombrecaj memoroj elmerĝis. Ne estis interligitaj la ŝanĝemaj kaj malklaraj bildoj, kiuj altrudis sin. Ili similis al malluma ĥaoso, lumigata de fulmoj subite ekflamiĝantaj. Nebulaj pejzaĝoj preterpasis, tuj englutotaj de la mallumo, el kiu ili eliĝis. Siluetoj aperis kaj ĉesante spiri, Cécile vante provis pli klare ekkoni iliajn konturojn.

Dufoje surprizinte la edzinon en tiu stato de raviteco, Raymond estis demandinta : « Ĉu vi revas ? »

Ŝi pensis ke la demando ne indas respondon. Car ŝi bone sciis, ke ŝi ne sonĝis, sed mirakle posedis la maloftan kapablon, memori la okazintaĵojn de antaŭa estado, kiuj momente kvazaŭ fantomoj emerĝis el ŝia subkonscio. Ŝi nepre maldubis, ke ŝi antaŭe estis nobela sinjorino, kaj tio aperis al ŝi kiel la sola klarigo de la nekontraŭstarebla malinklino, kiun sentigis al ŝi la mizeraj bagatelaĵoj de ŝia nuntempa vivo.

Raymond, al kiu ŝi iuvespere malkaŝis tiun konvinkon, estis respondinta kun maldelikata bruteco : « Nobela sinjorino ? Kio do krome ? Vi farus pli bone, ripari miajn ŝtrumpojn anstataŭ plezure pripensi tian stultaĵon. »

Tiam ŝi ekkonsciis, ke tiu homo neniam povos kompreni ŝin kaj ŝi retiris sin malantaŭ fortikaĵo de fieraĉa silento, kiu fine malesperigis la simplaniman kunulon.

Per laboro kaj ŝparemo Raymond fine atingis, ke li povis aĉeti malnovan aŭtomobilon. Estas vero, ke ĝi estis iom eluzita kaj ne tre forta, sed ĝi tamen posedis kvar radojn kaj muntkadron.

La unuan dimanĉon post tiu aĉeto, la nova aŭtomobilisto demandis sian edzinon : « Kien mi veturigu vin ? »

Seninterese Cécile respondis : « Kien ajn vi volas; al mi ĝi estas nepre indiferenta. »

« Do ni forveturu, kien la hazardo kondukos nin. »

Ili ekveturis.

Vasta kampara ebenaĵo etendiĝis antaŭ la maŝino ĝemeganta. Maldensa fumo kovris la blugrizan ĉielon. Relparo trapasis la ŝoseon, aro da korvoj kirlis supren, kvazaŭ nubo de karbopolvo.

Kiam la veturilo pasis tra la vojkruciĝo, Cécile subite ekvokis : « Ĉu estas eble ? »

« Kio do ? »

« Neniam mi estis ĉi tie kaj tamen mi rekonas la pejzaĝon. »

La vojo malsupreniĝis, blueta arbaro kovris la deklivojn.

« Vi ja vidos ! » daŭrigis Cécile per voĉo tremanta pro emocio — post tiu vojfleksiĝo venos kastelo. »

Raymond intensigis la gasenfluon, la veturilo ektremis, la motoro spiregis, kaj baldaŭ aperis ronda turo inter la arboj.

« Sed tio tamen estas... » li diris senpripense.

« Nu, kion mi diris ? » triumfis Cécile. « Vi vidos, unue oni veturas tra flanka pordo, poste oni venas en korton pavimitan, poste estas pordeto maldekstre. »

Kun vangoj ardantaj, kvazaŭ ekstaze, ŝi insiste parolis al sia edzo kiu, konsternegita de tiu miraklo, kun teruro ŝin aŭskultis.

« Mi ĉiam sciis ĝin, iam mi estis nobela sinjorino — sendube en tiu ĉi kastelo mi vivadis, ĉi tie en mia kastelo ! Kun fermitaj okuloj mi povus gvidi vin tra ĝi. »

La radoj grincis sur la sablo. La veturilo ekhaltis.

« Rapide, daŭrigu rapide ! » kriis Cécile.

Ili veturis tra flankpordo — atingis pavimitan korton — paŝis al pordeto...

« Ĉu vi nun komprenas, kial mi pereas en mia hejmo, kial la modestaĉa vivmaniero, kiun vi havigas al mi, estas tiom nesuferebla ? »

Du pordegoj dupartaj estis malfermitaj al la ĉeffasado de l'kastelo.

« La vizitantoj, mi petas ĉi tien ! » vokis la gardisto, atentigita per la aŭtomobila bruo.

Cécile kapneis.

« Ne », ŝi diris mallaŭtege, « ĉi tiun enirejon mi ne konas.»

Ambaŭ manojn ĉe la kapo, per puŝaj paŝoj, kvazaŭ pelata de forto nevidebla, ŝi aliris la pordeton, kiu en tiu momento ŝajnis nerezisteble altiri ŝin.

« Ĉi tie mi eniradis — ja ĉi tie — mi rememoras — jen la vojo... »

Tiam la gardisto alproksimiĝis barante la vojon.

« Mi petas, sinjorino ! ĉi tie ne estas eniro. Tiu pordo kondukas al la iamaj kuirejoj. »

« Al la kuirejoj ? »

« Jes, sinjorino. Antaŭe tiu enirejo estis nur por la servistaro. Hodiaŭ ĝi nepre ne plu estas uzata. »

Cécile fikse rigardis la edzon — terurigita.

« Al la kuirejoj... »

En ĉeesto de la gardisto konsternita, ŝi pasie ekploregis.

Tradukis : EJUNA.

Notoj

La plej profunda lago en Eŭropo. — Profesoro Mŭnster, geografo norvega esploris dum pasinta somero kelkajn lagojn en Norda Norvegujo. Li tiam konstatis ke Hornindalsratn estas 514 metroj profunda, do superas la Mjosa lagon, kiu kun 443 metroj estis konsiderita kiel la plej profunda lago. La proporcia profundeco de Hornindalsratn estas 237.3 m, la Mjosa 187. Ĝi estas do la plej profunda lago ne nur de Europo, sed verŝajne de la tuta tero.

Carnegie-Fundaĵo. — La Carnegie-Fundaĵo, en Hago aljuĝis la Wateler Paco-Premion, sumon de 20.000 Guldenoj al la Haga Unuiĝo por la Ligo de Nacioj.

Antikvaj Biblio-manuskriptoj. — En germana revuo « Gnomon » aperis informo pri la manuskriptoj de bibliaj tekstoj, kiujn akiris A. Chester Beatty, usona kolektanto. Tiuj manuskriptoj kies trovo kaŭzis sensacion en interesitaj rondoj, datas el la dua kaj tria jarcento, sekve superas laŭ aĝo ĉiujn aliajn. Estas dekdu diversaj manuskriptoj, ĉiuj papirusoj en kodformo, kune 180 pli malpli bone konservitaj folioj. Deksep folioj el la Deŭteronomo (Readmono) kaj Nombroj, certe apartenas al la unua duono de la dua jarcento, fragmento de folio el Jeremio el la fino de la dua jarcento kaj al la tria folioj el Genezo, Jezajo, Estero, Ezekielo, Danielo, la kvar evangelioj kaj la Apostola Historio, leteroj de Paŭlo kaj la Apokalipso.

Kolosa magneto. — En la naturscienca laborejo de la universitato en Leiden, Nederlando estas instalita giganta magneto, konstruita de la firmo Siemens & Halske Berlin. Ĝi estas la dua magneto laŭ grando, la plej granda troviĝas en Parizo. La Leidena magneto estas 2,43 m. alta kaj pezas 14.000 kg. Ĝi servas speciale por eksperimentoj en submalvarmigita aero.

Donaco al Pola ŝtato. — Grafo Adamo Branicki, pola nobelulo kies bela palaco troviĝas en Bialystok, donacis sian bibliotekon de 50.000 volumoj, kolekton de 15.000 malnovaj gravuraĵoj kaj pentraĵoj al la pola ŝtato.

Antaŭ sesmil jaroj. — En lando Ur, kie vivis Abrahamo, jam de kelkaj jaroj usona arkeologo elfosis mirindajn pruvojn de antikva kulturo, pli antikva ol la egipta. Temas pri la Ŝumera Popolo. Laŭ nova informo de l'arkeologo Woolley oni trovis laste aron da tomboj inter ili tiaj de reĝoj kaj en tiuj tomboj multajn objektojn uzitajn por la ceremonio entombiga. En la antaŭparto de l'tombo oni trovis 39 korteganinojn en plena ornato. Oni trovis artobjektojn de nekomparebla beleco kaj natureco, ekzemple plastikon kiu reprezentas virŝafon. Oni liberigis subteran domon el kalko kun multaj koridoroj kaj ĉambroj. Ankaŭ tabuletoj kun skribkarakteroj en antikvaj formoj, alkalkuleblaj je la plej malnova skribo en Mezopotamio trovita.

Albert Thomas †

La tutmonda gazetaro jam priparolis la morton de Albert Thomas, la senlaca kaj elokventa direktoro de la Internacia Laboroficejo. Ni scias kiom profunde sentas la perdon ĉiuj liaj kunlaborintoj en tiu granda institucio. Pluraj el ili estas niaj samideanoj. Al ili, al iliaj kolegoj kaj al la familio de la mortinto ni esprimas nian sinceran simpation.

Kun ilia perdita ĉefo kaj agema gvidanto nia Asocio havis dum dekdu jaroj amikan rilaton. Li mem prezidis paroladon de D-ro Privat pri Esperanto al sia oficistaro kaj decidis provi la uzadon de nia lingvo por presigo de bulteno kaj korespondado kun malproksimaj landoj. En oficiala raporto li konstatis la utilecon de tiu uzado.

Al niaj universalaj kongresoj li konstante sendis oficialan reprezentanton, plej ofte S-ron Tarelli. Ne estante mem esperantisto, li deziris malfermi la pordon al nia lingvo kun simpatia intereso. Eĉ iam li diris : « Ne miru, se iam mi lernus Esperanton por fari paroladojn eksterlande ! »

La rondoj de internacia organizo por paco, plibonigo de laborkondiĉoj kaj kooperativa ekonomio perdas energian apostolon, kies vasta inteligento kapablis kompreni ĉiujn problemojn kaj ties diversajn flankojn. Eĉ tiuj, kiuj ne konsentis kun li admiris lian genian laborforton.

Red.

Tra la Libraro

Literaturo. — Esperanto. — Scienco. — Politiko. Lernolibroj kaj Kalendaro

Jen nova romano, vere agrabla felietono, — ĝi ja aperis tia en *Heroldo de Esperanto*, — tradukita de Ludwig Goppel el germana lingvo : *Vagabondo kaj Sinjorino*, de Walther Kloepffer. Tute nuntempaj, postmilitaj aventuroj, (amerika miliardulo volas ruinigi Ivar Kreuger !) en kiuj la eventoj sinsekvas, la renkontoj trafe okazos, eble ne tre kredeblaj, sed tre variaj, neatenditaj; ili kondukas nin en Munĥeno, Zuriko, Marsejo, Nico, kaj farus tre taŭgan planon por alloga filmo. La heroo, eksoficiro, estas aventurulo, ne skrupule honesta, tamen kun nobla animo; li vice estas masonisto, kelnero, varieta ĵonglisto, savinto de rusa princino, mekanikisto aŭ eleganta dando, kaj fine, kiel reprezentanto de granda motorfabriko, edziĝas kun la sopirata filino de aŭtentika generalo. Li estas tia fatalulo, por kiu la hazardo faras miraklojn, tia belulo, instinkta delogisto, ke ĉiu virino, francino, amerikanino kaj germanino, pretas doni al li ĉion, eĉ sin mem. Do tre amuza distra legaĵo kun korekta flua stilo.

Pli moderna ankoraŭ : *Verda Karto*, romano gajninta unuan premion ĉe konkurso proponita de japana gazeto, ĉar ĝi ja okazas en 1980. Ankaŭ ĝia formo, kun oftaj lokŝanĝoj, mallongaj titolitaj ĉapitroj, tre similas filmaranĝon. Tiam domoj estos el vitro, oni vojaĝos nur aviadile, fumos junigan substancon, virinoj subpremos virojn, kaj ĉion faros elektraj maŝinoj; la heroo ĵus inventis senfadenan transsendilon por elektra forto; li poste provas maŝinon por senigi homon je ĝia animo kaj ĝin anstataŭigi per alia. Ankaŭ ne mankas insidaj spionoj, kaj grandan rolon ludas elektra senbrua revolvero, per kiu oni pafas al kontraŭulo dum diskuto, aŭ per kiu oni sin detruas, se nur oni eksentas ian « respondecon » pri ajna malsukceso. La tipo de la patrino, estrino de tutmonda aviadila kompanio, kiu devigas sian edzon al bankroto kaj sinmortigo, kiu en kolera gesto ĵetas glason al okuloj de propra filino kaj blindigas ŝin, estas terura figuro. Entute la libro, ĝis unua ĉapitro speciale, estas majstre kombinita. Sed la lego de tiu stranga romano estas peniga : vortoj estas malĝustsence uzataj : fortike por forte, optimisto por riĉulo, apenaŭ por preskaŭ, heroldo por informo, k.t.p. internaj pensoj de l' personoj montrataj per citiloj; frazoj tute ne kompreneblaj aŭ apenaŭ diveneblaj; ekzemple : « Pro la honora nomo de festeno oni devas sin doni kiel eble plej interkomplikiĝe kun sonĝoj. — Li estas organizanto de granda popolmovado al la mumioj, kiuj forgesas ĉian homecon je la maturo de materia civilizacio kaj ekstremeco de oro kaj sciencoj. — Ellitiĝinte Akira sin alportis antaŭ la tablo, kun kapo plena je doloro en la mano. » Ĉu japano ne povas verki lingvon kompreneblan por ni ? Tute ne, ni havas pruvon pri la malo. Do la tradukinto, se li posedas la gramatikon de nia lingvo, ne sufiĉe konas la sencon de l'esperantaj vortoj; ili ja kredeble ne korespondas kun la japanaj, tiom parence, kiom tiuj de okcidentaj lingvoj, kaj postulas por orientanoj pli fundan studadon.

La kvin rakontoj tradukitaj sub titolo : *Rumana Bonhumoro*, aperas en beleta eldono kaj tre bona stilo. Ili posedas lokan koloron, tipajn karakterojn, sed estas ofte pli ironiaj ol simple bonhumoraj. « Du lotbiletoj » montras avidon, krudon ĉe urbetanoj kaj amuzajn misokazojn; en « Oĉjo Rado » kamparano sprite spitas nobelon : « La staciestro » kaj « Li ne estas hejme » estas ŝercaĵoj, sed « La venkinto de Napoleono » plej plaĉis al mi, ĉar tre amuze pentrita estas tiu maniula profesoro, ĉiujn tedanta per sia vana dumnokta serĉado al forgesita propra nomo. Kiel diras la konciza bona antaŭparolo, konatiĝo kun alilandaj popolmoroj helpas antastaŭigi instinktan malamon per ŝata komprenemo.

La *Rakontoj por geknaboj* estas bona traduko el itala lingvo; ili temas pri simpluloj, malriĉuloj aŭ fariĝas veraj fabeloj; ofte poeziaj, en ili arboj, nuboj, steloj, domoj alparolas por veki simpatian kompaton. Iom malnovmodaj kaj sentimentalaj, ili pli plaĉos al knabinoj ol al knaboj, kaj oni povas demandi sin ĉu vere ili estas porinfanaj aŭ priinfanaj, ĉu junuloj tre ŝatos ilin, aŭ ĉu ili ne pli celas edifon ĉe maturaj personoj.

En *Solidareco*, novelo, ŝajne originale verkita, ni havas modelon de ekcesa stilo kun strangaj komparoj. Ĝi estas idilio de italino kun rusoj dum surtera kaj surmara lukto de revoluciuloj, meze de kanonpafado kaj naftbrulado. Jene sin esprimas la aŭtoro : « La steloj orfaj rigardas malsupren, kaj mi ĝoje levis la kapon kaj donacis miajn okulojn al la okuloj de la steloj. — Ĉiu vorto eniĝas kiel dinamito en la cerbon kaj kaŭzas en ĝi grandegan eksplodon de agitiĝo. La amaso atendis la finon (estas legata letero) kaj ŝajnis, kvazaŭ duonon de l'Himalaja montaro detruis subteraj akvoj... — La konata voĉo, kvazaŭ boateto alnaĝis sur siaj basaj ondoj kaj trovis bonvenan havenon en miaj oreloj. » Cetere, krom uzo de si, anstataŭ mi aŭ ni, la stilo ne estas malbona en tiu sovaĝa, entuziasma, tute aparta rakonto.

Mia poezio entenas 37 versaĵojn, longajn kaj mallongajn, originalaĵojn de hispana verkisto, Rafael de San Millán Alonso, lian portreton kaj biografian skizon de J. Mangada-Rosenörn. Laboro zorga, honesta, obeanta regulojn de versfarado, pri temoj oftaj ĉe poetoj : amo, tempforflugo, k.t.p., iom didaktika kaj ne tre altfluga, kun kelkaj tro facilaj rimoj kaj ŝtopvortoj. Kelkaj poemoj havas apartan ĉarman aŭ sencvaloron; jen du el ili :

Ĉe Sevilla

(laŭ « Segidiljoj », kanto kaj danco de Andaluzio)

Mi vidis vin; vi dancis
en la Foiro.
El mia koro eliris
dolĉa sopiro.
Kia korpeto !
Ha, mia kara, bela
brunulineto !

Kaj same kiel suno
varma kaj hela,
radias la vizaĝo
ĉarma kaj bela
Beno de Dio !
Vi dancas kiel flugas
la papilio !

Ravantaj viaj belo
kaj simpatio,
min igas jam kaptito
do, de l'Amdio;
lia la reto
min faras sklavo via,
brunulineto !

La moralisto

Kun mien' serioza kaj severa,
per parolad' frapanta kvazaŭ vipo
ĵetis la moralist' de sia lipo
la malaprobon, ĉu per voĉ sincera ?

Diris li — li ne estas hom' malklera — :
« Virto ja estas kvazaŭ forta ŝipo,
rekta baston', ne kurbigebla ŝtipo,
aŭ konstruaĵo granda ŝtono-fera.

Ĉiu malvirto, estas demonarto.
Vinon forlasu, ludon kaj virinon,
ĉar de la virt' devenas la bonfarto. »

Sed li drinkinte, kaj drinkinte vinon,
kaj disĵetinte monon per ludkarto,
ĵetis sur liton belan amatinon.

Biografio kaj priarta skizo, tradukita el angla originalo, *Giovanni Segantini*, « la stranga vilaĝana pentristo kaj mistikulo, la simbolisto, kiu montojn adoris kaj kiu pasigis sian vivadon en servado al ili. » Li trovis « ke la sekreto akiri efekton de lumo konsistas en la uzado de atomoj da koloro en apudeco, dividi la kolorojn, kaj anstataŭ miksi ilin sur la paletro, meti ilin flanko ĉe flanko sur la kanvaso, por ke ili miksiĝu en la okuloj de la observanto. » Bona verketo.

Ŝtala biblio de Samuraĵismo, broŝureto, konigas la simbolan gravecon de la glavo en Japanujo. « Oni respektis ĝin kiel la manifestacion de la kavalira honoro, alta karaktero kaj morala kuraĝo. — Duaflanke oni posedis la glavon kiel la memorigon de la puno, kiu nepre sekvos malbonan agon. » Ni ekscias pri procedoj de hardigo, pri famaj forĝistoj estintaj de tiuj glavoj hodiaŭ zorge konservataj. Kelkaj strangaĵoj en frazoj kaj vortoj.

En la nebulo, ankaŭ japanaĵo, moderna drameto en kiu sur ŝipo okazas murdo aŭ sinmortigo kun reapero de l'animo aŭ fantomo. Ankaŭ nebula restas pri ĝi la menso de l' leginto, ne pro la lingvo, sed pro la neklara simbolismo.

Nova grava verko por nia movado : *Historio de la Mondolingvo*, de E. Drezen. Bedaŭrinde formato, papero, preso, litertipo, — ne parolante pri kelkaj falintaj literoj aŭ preseraroj — kiujn premaj cirkonstancoj eble tiaj necesigas, ne havigas al la volumo la eksteraĵon, kiun ĝi meritus. Post « Histoire de la langue universelle » de Couturat kaj Leau, ni ne havis tian kompendion. Finaj listoj, kun fontlibroj, nomaroj de l' cititaj personoj kaj de l' priparolitaj lingvoj, kiel ankaŭ la marĝenaj titoloj, tre faciligas serĉadon en la tre ampleksa enhavo. Ĝi estas rezulto de 20-jara laboro, kaj pliboniĝis per ses sinsekvaj revizioj kaj kompletigoj. La aŭtoro povis profiti maloftajn verkojn el Moskvaj kaj Berlinaj bibliotekoj, kaj ankaŭ la riĉan bibliografion de P. Stojan. La kvanto de l' kunigita materialo devigis la aŭtoron al streĉa koncizo; do oni ne trovos, pri multaj projektoj, tiom da detaloj, kiom estas en la franclingva supre citita historio; sed la nuna estas en Esperanto kaj multe pli kompleta. Oni legos kun intereso, se ne ĉiam aprobante ĉiun ideon, la enkondukajn ĉapitrojn ĝeneraltemajn, pri lingvo en si mem, pri ĝia rolo, pri arta reguligo de lingva evoluo, kaj la finajn, pri la morgaŭa utiligo de Esperanto, kiun la aŭtoro konsideras nur provizora solvo, pri la tutmonda lingvo de l'estonteco, kiun Esperanto preparas, kaj kiu, iam, laŭ la verkinto, forigos la naciajn. La tuta serio de l' malnovaj strangaj proponoj, pasigrafioj, skrib- aŭ simbolaj lingvoj, renovigoj de latino, kaleidoskope pasas antaŭ la leganto. Por la unuaj periodoj, la ordo estas tiu de l' jaroj; por la lastaj, ni havas paralelajn ĉapitrojn pri la diversaj nuntempaj direktoj en la serĉado al mondlingvo. Ĉe la fino de l' ĉapitro, kiu ekzamenas la postmilitan rolon de Esperanto, troviĝas jena interesa konkludo : « La Esperanto-movado neeviteble kaj senkondiĉe daŭros esti centro kaj bazo de la tuta laboro por la mondolingvo, kiel gravega kaj neanstataŭebla faktoro de la praktika popolmasa akcelado al ĝi, garantianta ĝian vivon, progresadon kaj triumfon. En la potenca Esperanto-movado akumuliĝas la tuta sperto de ĉiuj internacilingvaj projektoj. Ne riskante facilanime rompi siajn formojn, pli kaj pli firmigante la fundamenton, starigitan ankoraŭ de Zamenhof, Esperanto facile proprigas al si ĉiujn taŭgaĵojn el aliaj sistemoj. Per sia aglutina strukturo ĝi cementigas admirindan lingvoponton inter Okcidento kaj Oriento. »

Ni do nune ne posedas pli plenan informilon pri ĉiuj projektitaj kaj provitaj mondlingvoj ol ĉi tiu verko, kaj feliĉe, ĝi ne nur estas per la liveritaj faktoj, referencoj, tabeloj, tre taŭga laborilo por studemuloj ĉe tiu fako, sed per la konsideroj, juĝoj de l'aŭtoro, per la detalaj ĉapitroj pri Volapük, Esperanto, Ido, per la aldonitaj portretoj, montroj de strangaj alfabetoj, ekzemploj, pri malmulte konataj projektoj, per la ĝeneraltemaj ĉapitroj, ĝi fariĝis ankaŭ verko leginda de ĉiu klera samideano. Pri la preciza korekta stilo de l' verko, la nomoj de l' unuaj tradukintoj, N. Hohlov kaj N. Nekrasof, tiu de l'aŭtoro, kaj eĉ nur la mallonga supra eltiraĵo estas certe sufiĉaj rekomendoj.

La *Zamenhofa Legolibro*, kompilita de M. Kidosaki, estas pruvo, ke eĉ en Japanujo, oni povas eldoni perfektan esperantan libron. Ĉi tiu povas servi kiel modelo por multaj eŭropaj esperantaj eldonejoj, ĉar papero, preso, senerareco, aranĝo, ĉio estas laŭdinda. Tri partoj dividas la volumon : en la unua estas elĉerpaĵoj el la verkoj tradukaj de Zamenhof, Fabeloj, Proverbaro, Revizoro, Biblio, Hamleto kaj Marta; en la dua, specimenoj el la originalaĵoj, Paroladoj, Lingvaj respondoj, Leteroj, Poemoj, diversaj studoj; en la tria, prizamenhofaĵoj eltiritaj el verkoj de Devjatnin, Drezen, Grabowski, Privat, Leono Zamenhof. La intervjuo de la unue citita verkisto, la biografio de la lasta, malpli konataj tekstoj, estas speciale interesaj. Post ĉiu ĉapitro estas kelkaj klarigoj en japana lingvo, kaj, en la sama, finigas la libron : Pilgrimo al Zamenhofaj urboj, kronologia tabelo pri Zamenhof kaj la movado de 1887 ĝis 1917, listo de verkoj. Ĉio utila por havi pri Zamenhof kaj lia verko plej ĝustan komprenon.

Jen estas N-ro 6, por jaro 1928, de *Raporto de la Aerologia Observatorio de Tateno* (Japanujo), grandformata, ducentpaĝa kajero, kun multaj cifertabeloj, pri la observadoj, pri vento per pilotbalono, sekvata de malsupre, rimede de teoloditoj (la balono foje atingas pli ol 15.000 m.), pri la observadoj meteorologiaj per kajto (flugdrako) kaj mallibera balono (ili portas observantojn ĝis 2.500 m.), kaj pri la observadoj faritaj surtere, trifoje ĉiutage, pri ĉiuj aeraj fenomenoj. Plie estas raporto kun teksto, tabeloj kaj grafikaĵoj pri nuboj, kumulusoj kaj stratusoj, trairitaj per mallibera balono. Ankaŭ tia esperanta scienca eldonaĵo estu modelo imitota de niaj Eŭropaj institutoj.

Leginte titolon : *Senbedaŭre amo rabas* sur la kovrilo de libro, oni tuj imagas sensacian amromanon, precipe memorante, ke ni jam konas la aŭtoron, Takeo Ariŝima, per bona novelo « Deklaracio » en la kolekto : Internacia Mondliteraturo. Grava eraro. Ĝi estas filozofia metafizika pensaro, kie per interna rigardo, mensa sinanalizo, senkaŝa elmontro de plej intimaj konceptoj, la aŭtoro rezonadas pri la esencaj principoj de l'intelekta vivo, materio kaj spirito, religio kaj Dio, instinkto kaj moralo, artoj, familio, socio, por alveni al tiu ŝajna paradokso, ke amo, fundamento de niaj agoj, ne estas sindono, sinofero, sed kontraŭe preno, akiro, egoismo, entute rabado de aliuloj. Tial la titolo. Persone mi ne kapablas tiel harfendi abstraktaĵojn, kaj lasas al pli kompetenta juĝon pri la verko. La aŭtoro ne ignoras modernan sciencon kaj filozofion, kaj la traduko estas bona.

Iom samtema estas broŝuro *Evangelio de sinkompletigo*, 6a kajero de serio pri « Belismo », nova religieca movado, kiu esence asertas, ke ĉiu povas kaj devas altigi sian spiriton kaj vivon per propra sinkulturo, sinhardado. Celo bona, konsiloj obeindaj, sed kiom da vortoj, ĉirkaŭiroj, malprecizaj difinoj kaj esprimoj, por diri ofte komunajn ĉies akceptitajn veraĵojn.

Enkonduko en la pedagogion, historia skizo de Hillar Sakaria, mallonga teksto, sed tre bona resumo pri la disvolviĝo de pedagogio, kies sinsekvaj progresoj estas klare difinitaj, kiu ĉefajn pedagogojn trafe prezentas kaj laŭmerite taksas.

La reklamilo de la *Mnemonika Instituto* de Prof. Fajnstejn en Vilno klarigas la celon de metodo por memorfortigo, montras programon de perletera kurso, kaj listigas asertajn leterojn de kleruloj aŭ studentoj, kiuj trovis en tiuj individuece prilaboritaj kursoj rimedon por koncentrigi sian atenton, plifaciligi sian lernadon.

En *Minaco al Mondpaco* ni trovas, bone tradukitan, petskribon de ĉefministro Tanaka al imperiestro de Japanujo, kiu, se vera, estas timiga dokumento pri la intencoj de tiu lando. Tia diplomata ruzeco, insido, senskrupula, senkonscienca fiagado estas ne kredebla; se ĝi ne estas mensogo, ĝi estas monstra pruvo de l' krimoj al kiuj povas konduki ŝovinista patriotismo. Tiel rezonas la ĉefministro en 1927 : « En la estonteco, se ni volas regi Ĥinujon, ni devos nepre subpremi Usonon, ĝuste kiel en la pasinteco ni devis batali en Rusa-Japana milito. Sed por konkiri Ĥinujon, ni devas unue konkiri Manĉurion kaj Mongolion. Se ni sukcesos konkiri Ĥinujon, la ceteraj aziaj ŝtatoj kaj la sudmaraj landoj timos nin kaj submetiĝos al ni. — Rigardante en la estontecon de Japanujo, milito kontraŭ Rusujo sur la ebenaĵoj de Norda Manĉurio estas neevitebla. — Kaj havante ĉiujn naturajn riĉaĵojn de Ĥinujo je nia dispono, ni plue iros por konkiri Hindujon, la Arkipelagon, Malgrand-Azion, Centran Azion kaj eĉ Eŭropon. » Ankoraŭfoje, ĉu mistifikaĵo, aŭ ĉu frenezaĵo, deliro, atentinda averto pri la flava danĝero ? La libreto estas leginda; ĝi estas senpage ricevebla de « International Relations Committee, N-o 5, Mao-tan Street, Nanking, Ĥinujo.

Pol-Pomeranio, bele eldonita libro, kun multaj landkartoj, de pola publicisto Kazimierz Smogorzewski, en traduko lerta de S. Grenkamp-Kornfeld, ekzamenas detale laŭ la tuta historio de Polujo, laŭ la lastaj ŝtatdecidoj, laŭ la nacieco de l' loĝantaro, laŭ komparo kun alilandaj similaj situacioj, la devenon kaj nunan staton de la regionoj konataj sub la nomo: « Pola koridoro ». Kompreneble la aŭtoro defendas la nunan vastiĝon de Pola teritorio per ĉiuj eblaj argumentoj, kaj certigas ke liaj samlandanoj neniam akceptos malgrandigon de posedo, kiu ne tiom atencis prestiĝon kaj ekonomion de Germanujo, kiom asertas ties reprezentantoj. Li pretendas la problemon pli psikologia ol reala, kredas interpaciĝon iam realigebla. « La tempo estas bonega adaptanto de la t.n. netolereblaj limoj. La vivo estas pli forta ol ĉiuj propagandoj. Tio kio ŝajnas stranga hodiaŭ fariĝos morgaŭ normala ». Povu li esti prava. La tradukinto provuzas kelkajn neologismojn.

Mi nur povas citi, tute ne pro manko da intereso, sed ĉar disponebla loko devigas oferi malpli ampleksajn tendencajn broŝurojn, por iom detale paroli pri libroj ĝeneraltemaj, la sekvantajn presaĵojn, propagandilojn por Sovetio, eldonitajn de Ekrelo en Leipzig.

Ĉe Abismo, ses teruraj rakontoj, kun murdoj, pendigoj, ribeloj, bataloj, ankaŭ naivaĵoj, okazintaj en Bulgarujo. Energia stilo de H. M. Ĥrima.

Apud Landlimoj, kvar skizoj de sovetaj verkistoj, kun detaloj pri klopodado al agrikultura reorganizo en foraj sovaĝaj regionoj, apud Besarabio, Koreo, Persio. Entuziasmo, troigo. Tro da specialaj teknikaj vortoj. En autaŭparolo, atakoj de E. Drezen kontraŭ Zamenhofa ideo, kontraŭ S.A.T.

Pro kio Johann Liebhardt estis premiita je ordeno de Lenin, ankaŭ entuziasma skizo pri karbminaj rekonstruado kaj raciigo en Donecbaseno, ankaŭ interesa sed kun tro teknika esprimaro.

La Krizo, komparo inter « ekputranta kapitalismo kaj la tuta potenco kaj avantaĝoj de la soveta socialisma ekonomisistemo. »

Kaj fine, en germana lingvo, *Was wir in Sowjet-Russland erlebten*, spertoj de kvar laboristoj vojaĝintaj per Esperanto dum ok semajnoj en U.S.S.R.

Hirt's Esperanto Taschenwörterbuch, 4a eldono, duobla vortaro, praktika formato, taŭga por komencantoj kaj kursoj. (Kial en afiksaro troviĝas la neoficiala « end » kaj mankas la oficialigita « mis » ?)

Das leichte Esperanto, 3a eldono, ŝatata lernolibro, kun bonaj ekzercoj por ripeto kaj ĉehejma laboro; ĝia « Schlüssel », taŭga por kontrolo ĉe memlernado aŭ radiokursoj.

Esperanto-Paradigmaro, por kursoj; je ĉiu paĝo multaj ekzemploj el kiuj oni trovos la regulojn, kaj inter ĉiu presita, unu blanka paĝo por la notoj de l' lernanto; praktika aranĝo. (Sed sufiksoj end, iv, iz, oz, en elementa lernilo !)

Wörterbuch Esperanto-Deutsch, de Emil Pfeffer, 4a eldono, malkara, simila al 3a, krom du aldonoj : listo de teknikaj vortoj kaj represo de la kvara Oficiala aldono al la Universala vortaro.

Cours prolétarien d'Esperanto, represo por francoj de la kurso de S. Rublov; malmulte da gramatiko, zorge elektita vort-provizo, modernaj tekstoj sovetemaj por lego kaj konversacio, preskaŭ nur esperanta bone elektita kaj ordigita enhavo; sufiksoj, io, end; sed kial mokaj nomoj por personoj en la ekzercoj ?

Lernilo de Esperanto-Stenografio, lerta alfaro, ne teoria sed naskita de praktika spertado, tre konsilinda por ĉiuj, kiuj jam uzas por la franca lingvo la simplan, facile lerneblan, geometrian sistemon « Aimé Paris ».

Du ŝlosiloj : *Nyckel till Esperanto*, por sveda lingvo, nova naŭa represo de Eldona Societo en Stockholm, kaj : *Ključ Esperanta*, por kroata lingvo, nova riĉigo de l' kolekto, eldono de Jugoslava Esperanto-Servo, ambaŭ kun la komerca vortaro, kaj sub patronado de I.C.K.

Finfine, plaĉa *Kalendaro*, murpendebla aŭ tablstarigebla, kun ŝirotaj semajnaj folioj, kie estas loko por notoj, pensoj kaj riĉa kolekto da diversnaciaj amuzaj humoraĵoj, kelkaj kun bildo; eldonaĵo de Heroldo de Esperanto.

Pardonu leganto la telegrafan stilon.

15. Aprilo 1932. G. S.

NUR DU SVISAJN FRANKOJN

Sendu al « ESPERANTO - CENTRO ITALA »
Galleria Vitt. Eman. 92 - MILANO

por ricevi regule
dum la venontaj monatoj de la jaro 1932.a

l'esperanto

dusemajnan gazeton
de la italaj esperantistoj

« l'esperanto » grandformata, dukolore presita, bone ilustrita, enhavas interesajn rubrikojn en esperanto kaj en itala lingvo. Inter ili:

La lingvo internacia tra la enciklopedioj, originale verkita de Stefano La Colla L.K.

Kurioza Okazaĵo, komedio de Goldoni tradukita de « Mevo ».

Esperanto - radio programo, zorge kontrolita laŭ naciaj programoj k.t.p.

Interesa kaj tipa propaganda gazeto je modera prezo

NUR DU SVISAJN FRANKOJN

Bildkarto de Svedlando

En antaŭa numero de *Esperanto*, ni informis pri la eldonaĵo de la Sveda Trafika Ligo, nome geografia karto plurkolora kun montro de distinga objekto apud la loknomoj. La bildkarto estas 90 cm alta kaj 58 larĝa. Dekstre troviĝas klariga teksto en Esperanto. Estas elokventa reklamo, imitinda ankaŭ de aliaj landoj. Plie la eldono en Esperanto estas pruvo pri la vigla agado de la Sveda Turista Komisiona Esperantista, pri kies agado ni raportos ankaŭ aliloke..

La bildkarton oni povas ricevi skribante al Svenska Trafikförbundet, Vasagatan 12, *Stockholm.*

Sveda Gimnastiko

La sveda gimnastiko akiris mondan reputacion kaj miloj da instruistoj studas kaj aplikas ĝin. La Sudsveda gimnastika Instituto en Lund organizas internaciajn somerkursojn dum Julio kaj Aŭgusto. Detala prospekto kun bildoj informas pri ĉio sciinda kaj oni povas ĝin ricevi skribante rekte al Sydsvenska Gymnastik-Institutet, Lund.

La prospekto (kajero) estas tradukita en Esperanto pere de la Esperanto Turista Komisiono en Stockholm.



Por helpi al UEA

La alvoko de la Komisiono de UEA trovis ĝojigan eĥon en la vico de nia membraro kaj kuraĝigaj estas la leteroj kiujn ni ricevis. Ili pruvas unu fojon plian, kiom UEA enradikiĝis en la koro de l'esperantistoj.

La Centra Kaso malfermis specialan konton por tiuj donacoj, kiuj servas entute por kovri la perdon kaŭzatan dum 1932 el la falo de la monkurzoj. Ni raportas sinsekve pri tio.

UNUA LISTO :

1. S-ino Ullastres, Mollet (Barcelona).	10.— Frk. svis.
2. S-ino F. Staes, Koekelberg, Belgujo.	1.000.— belgaj Frankoj.
3. S-ro Paul Bouvier, Genève	100.— Frk. svis.
4. F-ino Marshall, San Francisco ...	11,25 Frk. svis.
5. S-ro Donaldson, Bronx (N.Y.)	5.— Frk. svis.
6. S-ro F. W. Hipsley, Grantham	5.— ŝil. anglaj.
7. S-ro G. R. Warburton, Birmingham.	10.— ŝil. anglaj.
8. S-ro Rhodes Mariott, Rhos on Sea.	1.— brita funto.
9. S-ro W. Phillimore, London	1.— brita funto.
10. F-ino J. B. Partridge, Kilbirnie ..	10.— ŝil. anglaj.
11. F-ino Jeantellet, Vevey (tri donacetoj)	20.— Frk. sv.
12. S-ro Richard Levin, Lyon	62,50 Frk. francoj.
13. S-ro Ed. Stettler, prezidanto de UEA, Bern	500.— Frk. svis.
14. S-ro Rogister, Genève	20.— Frk. svis.
15. S-ro Georg Agricola, Genève	100.— Frk. svis.
16. S-ro J. Leakey, Greybole	2.— britaj funtoj.
17. Sennoma	300.— Frk. svis.
18. S-ro V. Vignet, Menton	10.— Francaj Frk.
19. S-ro Saget. D de UEA en Elbeuf,	100.— Francaj Frk.
20. S-ino Tissot, DM de UEA, Basel ..	200.— Frk. svis.
21. S-ro Fred H. Mc Mann, New York.	5.— Dolaroj usonaj.
22. S-ro Southwick, D de UEA en Uxbridge (Mass.)	5.— Dolaroj usonaj.
23. S-ro T. L. C. Bluett, Chessword,	10.— ŝil. anglaj.
24. F-ino A.B. Edwards, Bishop Auckland	16.— ŝil. anglaj.
25. S-ino L. Merkel, Ahlen, Westfalen.	100.— Germ. Mark.
26. F-ino Brouwer, Den Haag	10.— Gulden Ned.
27. S-ro Lindemann, Remscheid, Germ.	5.— Germ. Mark.
28. D-ro Bluth, por grupo Neuenahr,	10.- Germ. Mark.
29. S-ro Henry Hetzel, Philadelphia ..	20.— Dolaroj.
30. S-ro Redolfi, Genova (kolekto inter grupanoj)	50.— It. Liroj.
31. S-ro Lefevre, Viroflay, Francujo ..	50.— Frk. Frankoj.
Sume 31 donacintoj. Suma valoro de	2.010.63 Fr. svis.

Al ĉiuj bonvoluloj koran dankon.

Genève, 31 Majo 1932. *Centra Kaso de UEA.*

Pri la atakoj de S-ro Onnen, Hago

En tempo de danĝero
pruviĝas la amikoj.

Senlaboreco kaj monmanko, internacia malfido kaj malordo, jen la nuna tempo. Ĉiu ŝtato, ĉiu organizo klopodas eltiri la lastajn moralajn rezervojn el siaj anoj, petegante forlasi la internajn disputojn por komuna defendo kontraŭ la minacanta pereo. Tiel ankaŭ agis la Esperantistoj; tiel agis UEA kaj jam ricevis multajn signojn de varma simpatio. Afablan dankon al ĉiuj skribintoj kaj donacintoj.

Por ke ne manku la escepto al la regulo, S-ro Onnen, estinta Ĉefdelegito de Nederlando, elektis la nunan epokon kiel plej oportuna por semi malpacon inter la membroj. Ĉar al la Direktoro kaj estraro ĉesis la pacienco daŭre respondi al liaj instrupetoj, demandoj, proponoj, kritikoj kaj plendoj, li disdonis pasintan aŭtunon tutan broŝureton kontraŭ ni. Nekontenta pri la enlanda sukceso — la Nederlandanoj simple elektis alian Ĉefdelegiton — li presigis novan atakon, kiun laŭŝajne li dissendis al la Delegitaro. Kiel pruvas la leteroj kaj rifutoj de ni ricevitaj, li mankis la celon denove. Verŝajne li nun serĉos sukceson pli facilan ĉe publiko ne bone nin konanta, kie malbonfamigo trovos pli aŭdemajn orelojn. Pro tiu kaŭzo ni respondas mallonge al kelkaj pretendoj.

« *En la tuj postmilitaj jaroj UEA ĝuis tutmondan simpation, viglan kreskon de membronombro kaj kasrimedoj, ĝis subite en* 1925 *haltis tiu ĝojiga stato, kaj ne revenis.* »

Jen la dua frazo de la alvoko Onnen, jen jam la unua kaj grava erarigo de la publiko ! La vero estas, ke, por rekonstrui la disfalintan movadon kaj ebligi aliĝojn al UEA, ĝia Komitato funkciigis la Asocion parte el la kapitalo, kun jaraj deficitoj inter dudek kaj tridekmil frankoj, kaj kunkalkulante la klopodojn ĉe la Ligo de Nacioj, ĵetis proksimume okdek mil frankojn en la aferon. (Oficialaj raportoj al la kongresoj en Praha, Helsinki, Nürnberg, Vieno k.t.p.). Pro tiu eksterordinara klopodo ni atingis la plej favoran ciferon de 9.424 membroj dum 1925, sed ankaŭ komencis plialtigi la naciajn prezojn de la kotizoj, reduktis la alpagojn el la kapitalo k.t.p. Depost 1925 la membronombro estis : 8.687, 9.100, 9.071, 9.113, 9.062 kaj 8.835 en 1931. Estas la malplimultiĝo je 600 membroj inter 1925 kaj 1931, kio « *pruvas la ne-prosperon de la Asocio* ». Ĝia kaŭzo nur povas esti la « *netaŭgeco de la kondukantoj* », pliaj eblaj kaŭzoj ne eniras la kapon de nia kritikanto. Male « *ekzistas por UEA abunda kvanto da favoraj cirkonstancoj pere de kiuj ĝi povus akiri ĉiujare centojn, eble milojn da fidelaj membroj, se ĝi nur estus taŭge gvidata.* » Feliĉa optimisto, kiu en la jaro 1932 trovas favorajn cirkonstancojn ! La seriozajn legantojn ni simple atentigas ke 600 el 9.400 faras perdon de 6,6 %, suferitan en « favora » epoko dum kiu ruiniĝis la financoj de gravaj landoj, kaj krakis mondfamaj entreprenoj. Kian kriegon elpuŝos amiko Onnen ĉi tiun someron, pri malmultiĝo multe pli granda kaj minaca kasstato ?

Laŭ Onnen, UEA ja facile devus rezisti la mondkrizon « *ventego povas nur skuigi, ne difekti tutsanan arbon.* » Tutaj arbaroj, de ventego faligintaj, ŝajnas esti tiom nekonataj al S-ro Onnen kiom la graveco de la mondmizero. Per infana komparo li kovras la mankon de serioza pripenso.

« *La Estraro de UEA ne mantenas la Statuton.* »

S-ro Onnen : La statuto ordonas du kunvenojn por la Teritorioj.

La vero : Art. 27 statuto : « La Ĉefdelegito kunvenigas la Delegitojn almenaŭ unufoje jare, prefere dum nacia Esperantista kunveno. »

S-ro Onnen : La statuto ordonas du kunvenojn por la Estraro.

La vero : Art. 35 : « Komitato kaj Komisiono — kunvenas ĉiujare, okaze de la Kongreso, la Komisiono se eble pli ofte.

S-ro Onnen : Jaraj kongresoj neniam okazas; tiurilate la Estraro kondutas kiel la kukolo, kiu utiligas alies neston, k.t.p.

La vero : UEA tiom regule kaj samloke kongresis kiom la aliaj Esperantistoj. Per la konata kontrakto de Helsinki, UEA fariĝis oficiala institucio de la movado, sekve prezentas nun siajn raportojn dum la oficialaj kongreskunsidoj. (Viena kongresa regularo, 1924.) Jen la utiligo de « alies nesto ! »

S-ro Onnen : Kontraŭstatuta estas la stranga funkcio « Direktoro de UEA », kompreneble tre grava funkcio, kiu tamen ne estas trovebla en la statuto. Por ĝin direktadi la Prezidanto ne anstataŭigu sin de alia persono.

La vero : Titolo kaj taskoj de la Direktoro estas difinitaj en art. 39. Tiuj de la Prezidanto en art. 33.

La titolon : « Direktoro de UEA », S-ro Onnen trovus, se li donus al si la penon esplori antaŭ ol kalumnii, en la raporto de la Direktoro de UEA, Hector Hodler, 2a kongreso de UEA, Antverpeno 1911 ! Post 21 jaroj de uzado la titolo aŭ funkcio fariĝis kontraŭstatuta !

En sia prediko pri la graveco de la statuto, nia plendanto konstatas « *fatalan senzorgecon koncerne la efiktenadon de la statuto* » kaj opinias ke tiu « *ne-laŭstatuta pozicio ne malplaĉas al la estraro, kiu per ĝi ja havas pli da libereco agadi sen kontrolo.* Nu, *la* « *leĝdonintaro, de* 1920, *kiu tutbone komprenis la dezirindecon de regulaj kunvenoj* » estis gvidita de S-ro Stettler, kaj li mem verkis la nunan kiel la antaŭan statutojn de UEA. Estas pli ol strange, ke S-ro Onnen volas instrui la aŭtoron pri sia verko, lin riproĉanta pri malobeo al siaj propraj ideoj.

Por pliviglligi la interŝanĝon de opinioj, Prezidanto Stettler iniciatis 1930 la paskajn kunvenojn de la Komisiono en Genève, al kiuj la Komisionanoj alveturas el malproksime, oferante siajn festotagojn al kruda laboro. La danko de Onnen ? La konstato ke, se tiuj kunvenoj estas taŭgaj, ili devus ekzisti jam de longe kaj ke sekve... oni havis malordon.

El tiu tuta ĉapitro ni akceptas unu solan rimarkon, nome ke ne ĉie estas Vicdelegitoj, ne ĉie okazis regule lokaj aŭ teritoriaj kunvenoj. Ĉu ni respondu, ke ne ĉie Vicdelegito estas trovebla, ke ne ĉie la Esperantistoj estas agemaj, kaj ke UEA ne ankoraŭ havas policanaron por ilin devigi ?

« *La membroj ne estas informataj; estas pendanta dika vualo inter la Anoj kaj la Estraro.* »

Jen la faktoj: La Komitato estas informita plurfoje dumjare per cirkuleroj de la Direktoro kaj Prezidanto, kaj voĉdonas pri ili. Dum la kongresoj la kutime malmultaj Komitatanoj kunsidas, invitante al la kunveno (ĝoju, S-ro Onnen, tio ne estas en la statuto) la troveblajn Ĉefdelegitojn kun konsila voĉo. Krom tio, la malgranda Komitato, (la Komisiono), interŝanĝas pliajn cirkulerojn; la Ĉefdelegitoj ricevas specialajn cirkulerojn de la Direktoro, la Delegitoj la Oficialan Bultenon, la abonantoj estas informataj en *Esperanto*, la membroj per la Jarlibro, kaj ĉiu ajn, preta oferi la modestan prezon, povas legi la jarraporton en la « Esperantista Dokumentaro », eldonita de l'ICK.

Se tio ne sufiĉas tranĉi la dikan vualon de S-ro Onnen, ni petas pardonon, « Ultra posse nemo obligatur ».

« *La gazeto ne havas allogan enhavon; ĝi ne estas efika varbhelpilo.* »

Tion S-ro Onnen pruvas matematike; de 1921 ĝis 1931 la nombro de Membro-Abonantoj falis de 77 % el la tuta membraro al 66 % !

Respondo : Bilanco UEA 31 Okt. 1921. (*Esperanto* kaj raporto Nürnberg) Membroj entute : 5.983. MA 4.379. Enspezoj el la MA : fr. 28.833.—.

Bilanco UEA 31 Okt. 1931. (*Esperanto*, Januaro 1932). Membroj entute : 8.835. MA 5.229. Enspezoj el la MA : fr. 44.069.—. Meza enspezo el MA : 1921 : fr. 6.47. 1931 fr. 8.60.

La solvo de la enigmo troviĝas en tio, ke iom post iom ni altigis la favorprezojn al landoj kun malbona valuto, ne povante daŭre liveri por 6 ĝis 7 fr. tion, kio devus enspezigi 10 fr. Sed nia feliĉa kritikanto vivas en lando ŝajne sen krizo, kun bona valuto, juĝante internaciaĵojn el la muroj de sia laborĉambro.

Pri la « allogeco » de nia gazeto ni simple atentigas kiom malfacilege estas redakti revuon kiu ektuŝu nek politikan, religian, nacian problemojn, nek alportu novaĵojn jam konitajn, nek fariĝu tro lingva, nek tro literatura, teknika, komerca, nek kaj nek ! Eksterulo havas neniun ideon kiom malfacile troviĝas ĝusta mezo, pli malpli al ĉiu plaĉanta, kaj kiom observemaj estas certaj legantoj pri trapaso de ia limo, de ili en siaj pensoj fiksita.

Kia malfeliĉo, ke nia redaktoro D-ro Privat eĉ ne povas lerni ĉe S-ro Onnen kiel oni agus pli bone. « *Ne estas mia tasko — eĉ ne se petita — plibonigi la gazeton* » deklaras fiere la kritikanto, « *mia tasko estas averti la Estraron pri tio, kion mi observis en la Teritorio, kaj tion farinta, mia tasko estas finita.* »

Rilate la administraĵojn ni rapide klarigas, ke oficiala kontrolo de la Kaso, farita de « reprezentanto de banko », fariĝis malebla pro decido de la Ĝenevaj bankoj, malpermesi al siaj librotenistoj uzi la nomon de la firmo por tiaj privataj laboroj. Daŭra kontrolo de banko estus multe tro elspeziga, sekve ni prenas nuntempe eksperton pri librotenado anstataŭ bankisto. Plie kontrolas surloke la Komisionanoj, dum la Paska kunveno.

Al la personaj atakoj de S-ro Onnen ni ne respondas, cetere ankaŭ ne kapablus klare respondi, ne komprenante ilian logikon. Iam, dum la tempoj de S-ro Hodler kaj ĝis 1925, la Asocio bone prosperis, poste ĉio fariĝis malbona ! Sed de 1921 ĝis nun, estris preskaŭ la samaj personoj, funkciis la sama Direktoro kaj Redaktoro. Ĉu do ili estis ĉiam maltaŭgaj, malgraŭ la prospero, ĉu ili montriĝis nekapablaj kiam ili havis la malfeliĉan ideon akcepti S-ron Onnen kiel Ĉefdelegito, aŭ ĉu subite ili fariĝis tro maljunaj kiam ili ĉesigis siajn rilatojn kun li ?

La plendo pri nerespondo al leteroj koncernas la agadon de S-ro Onnen kiel Ĉefdelegito. Per multaj klopodoj li pligrandigis sian membraron kaj por tio meritas dankon, kiun ni ankaŭ ripetas ĉi tie. La malinterkonsentoj kun li ekstaris pro liaj skribaĵoj (59 dum 1930), al kiuj nia Direktoro respondis el la oficejo kaj hejme tiom kiom lia tempo permesis. Daŭre nia superfervora Ĉefdelegito petis formulojn kaj instruojn; ilin ricevinte li opiniis ilin ne taŭgaj kaj volis aliajn; legante la statuton, laŭ la logiko montrita, li cerbumis pri la rajtoj kaj devoj de sia ofico, pri la teritoria kaso, k.t.p. Vane respondis plurfoje la Vicprezidanto kaj unufoje la Prezidanto. S-ro Onnen restis kaj nedube restos la nekomprenata profeto.

Intence la statutaj kondiĉoj pri Teritorioj lasas liberecon kaj iniciaton al la Ĉefdelegitoj. UEA havas nuntempe 24 Ĉefdelegitojn, kiuj scias sin aranĝi, ne fariĝante reĝetoj. El ĉiuj iamaj kaj nunaj personoj havintaj tiun oficon tutaj du estas plendintaj, unu en 1928, la alia nun. Eĉ se iam venos tria aŭ kvara, la danĝero de tiu ofico por la persona ekvilibro ne estas pruvo kontraŭ ĝia utilo.

Per alvoko al la novelektita Komitato kaj nun al la publiko S-ro Onnen volas savi la Asocion de la netaŭga Estraro. La sorto volas, ke en Hago, la urbo de la plendanto, loĝas escepte du Komitatanoj : la enlanda, S-ro Isbrücker, kaj nia reprezentanto por Rumanujo, pastro Andreo Cseh. Sed ambaŭ, post sensukcesaj klopodoj komprenigi al S-ro Onnen diversajn aferojn kiujn facile komprenis liaj elektantoj, lasis la senesperan problemon. En la nova Komitato ne leviĝis unu voĉo por subteni liajn plendojn, malgraŭ demando.

Ke S-ro Onnen nur celas la bonon de UEA, tion ni kredu je lia honoro, ke li konkludas malrekte, tio vidiĝas el liaj skribaĵoj. Sed ni bedaŭras ke tiom supraĵe, laŭ sola studo de kelkaj paperoj en lia tirkesto, li provis publikan malbonfamigon.

Ĉiam aginte malkaŝe kaj bonkonscience, ni ne cedos al la postulo de malkontentulo, forlasi niajn postenojn dum la plej danĝera momento, kaj restos fidelaj.

La Komisiono de U E A.

Universala Esperanto-Asocio

Centra Oficejo : 1, Tour de l'Ile, Genève, Svislando

Oficiala Informilo

Administra jaro 1932 **N-ro 19** **Junio-Julio 1932**

Stato de UEA. — Je la 31. 5. 32 la Centra Kaso enskribis 6.537 kotizojn (de unua de Nov. 1931 ĝis 31 Majo 1932). — Por komparo servu la nombroj por 1931, je sama epoko:

1932	*Kotizoj :*	1931
82	Helpmembroj	94
2.248	Membroj (M)	2.223
3.757	Membro-Abonantoj (MA)	4.364
480	Membro-Subtneantoj (MS)	463
6.567 (1932)	Stato 31an de Majo:	(1931) 7.144

Garantia Kapitalo. — Akiris ateston al la Garantia Kapitalo kaj per tio ĉi Dumvivan Membrecon de UEA :

Atesto : Dua Serio :

Antaŭa sumo	Frk. Svis.	14.100.—
48. D-ro Ignacy Dziedzic, Torún, Pol. ...	Frk. Svis.	300.—
	Frk. Svis.	14.400.—

Ni memorigas, ke atesto al la Garantia Kapitalo de UEA kostas 300 Frankojn svisajn. Oni povas pagi en partoj, dum daŭro de tri jaroj. La atesto de la G.K. de UEA rajtigas je dumviva membreco al la Asocio, dumviva abono al *Esperanto* kaj rajtigas ricevi ĉiujn dokumentojn fiksitajn laŭ la statuto aŭ laŭ decido de la Komitato.

Kunveno de UEA dum Nacia Kongreso. — Okaze de la Brita kongreso la ĉeestantaj anoj de UEA kunvenis kaj aŭdis raporton de Komitatano Paul Blaise. Post ĝenerala informado la kunveno akceptis rezolucion, proponitan de S-ro Currie, Honora Membro el Burnley kaj subtenitan de S-ro Wright, el Birminghami :

« *Anoj de UEA kunvenintaj en Southport, okaze de la 23-a Brita Esperanto-Kongreso, aŭdintaj de S-ro Blaise detalajn klarigojn pri la nuna malfacila situacio de la Asocio:*

esprimas sian plenan konfidon al ĝia estraro;

ĝin dankas pro ĝia konstanta sindoneco al la movado,

promesas ĝin helpi laŭeble per varbado de anoj kaj diskonigo de ĝiaj servoj.

Plie la kunveno sendas specialan dankon kaj kuraĝigajn vortojn al Direktoro Hans Jakob kaj al la Geneva oficeja stabo pro ilia senĉesa kaj sindona laboro. »

Teritorioj. — La Komisiono post raporto de la Direktoro starigis teritorian organizon kaj nomis ĉefdelegitojn:

1. Norvegujo : ĈD : S-ro Arne Arnessen, Böndernes Bank, Oslo.

2. Portugal.: ĈD : S-ro Jorge Sandanha de Carreira, Avenida Duque de Loulé 50-III.

Ni bonvenigas la du novajn ĉefdelegitojn kaj deziras al ili en ilia laboro plenan sukceson.

Adresaro : Novaj lokoj kun Delegitoj

Alĝerio

Alger. — D: Philippe Planès, 51, rue Michelet.
VD: Simon Salmon, 1, rue Guillaumet.
Constantine. — D: Luben Diacoff, 17 rue Brunache, chez Mme Sacomant.

Argentino

La Plata. — D: Salvador Querin, Stenografisto, 17-1267.
Mar del Plata. — D: Ireneo Antonanzas, Calle Alberti 3065.

Aŭstrio

Sankt Martin bei Lofer. — D : Wilhelm Sinnhuber.

Britlando

Berkhamsted. — D: M.J. Elliot, pastro, « Westoe » Ashline Rd.

Ĉeĥoslovakio

Eisgrub-Lednice (Moravio). — D: Lambert Luniaczek, studento Höhere Obst und Gartenbauschule.
Filippsdorf (Bohem). — D: Augustin Arnold, No-225.
Pribram (Bohem). — D: Josef Veyvoda, Zizkova 296.

Danlando

Brönderslev. — D: Henry Christensen, Bredgade 12-11.

Francujo

Anzin (Nord). — D: Ernest Payen, studento, 3 bis, rue V.-Hugo.
VD: Jean Dulière, instruisto, 2 rue Carnot.
Blausasc-Escarène (Alpes-Maritimes). — D: Petro Stoïan.
Gap (Hautes-Alpes). — D : Léon Disdier, urba ĉefkasisto, boulevard de la Liberté.
VD: Léon Faucher, ĉefkontrolisto imposta, 15, rue Aubanel.
Lens (P.-d.-C.). — D : Jean Rozenblum, 10, rue Félix-Faure.
Peychagnard (Isère). — D: Paul Fabre, instruisto, par La Mure.
Valenciennes. — D : F-ino Paule Samson, 44 rue Despinov.
Villeurbanne (Rhône). — D: Victor Godivivier, 7 G-de rue des Charpennes.

Litovujo

Mazeikiaj. — D: D. Delatickas, librotenisto.

Nederlando

Kolham (Groningen). — D : Nanno Benninga, lernejstro.
Schagen (N. H.). — D : K. Roggeveen, Laan hoek Landbouwstr.
Scharmer (Groningen). — D : Johannes Freye, lernejstro F. 87.
Sneek (Frislando). — D : Reinoud Frank, Leeuwarderweg 70.

Persujo

Recht. — D: Mirza Mahmud Gulŝeni, Sraje Gulŝen.

Svedlando

Linköping. — D: F-no Anna Gyllsdorff, Drottningg. 43.

Usono

Summit (New Jersey). — D : John Bovit, advokato, 414 Springfield Ave.

La supraj elektoj fariĝos valoraj se ĝis 30 tagoj post la nuna publikigo neniu membro protestos pro gravaj kaŭzoj. Intertempe la novaj D kaj VD agas provizore.

EKSIĜOJ & FORSTREKOJ

Ne plu estas D en jenaj lokoj :

Aŭstrio : Alt Nagelberg ; Atzgersdorf ; Hollabrunn.
Britujo : Withernsea. — Hispanujo : S-ta Madalena.
Islando : Stad i Sugandafirdi. — Svislando : Rapperswil.
Usono : Camden (N. J.). — Cicero (Illinois).

Statistiko de la Delegitoj.

Stato je la 15 Aprilo 1932	1.934 lokoj
Lokoj forstrekitaj laŭ supra listo	10 lokoj
	1.924 lokoj
Novaj lokoj de 15.4. — 15.5.32	25 lokoj
Stato je la 15. Majo 1932	1.949 lokoj

Genève, 15 Majo 1932. Hans Jakob, *Direktoro de UEA.*

La voĉo de dankado

... Bonvolu akcepti miajn plej korajn dankojn pro la verkoj kiujn vi afable sendis al mi kiel premiojn. Mi ŝategas la ORIGINALA-n VERKARO-n de Zamenhof kaj vere, fariĝi subtenanto de UEA estas treege profita afero. Mi ne scias kiel estas eble al vi donaci tiel valorajn premiojn. Mi estas esperantisto de du jaroj kaj je la unua jaro mi tuj fariĝis membro de UEA kaj tiun ĉi jaron Subtenanto kaj restos tia dum mia tuta vivo. Mi esperas varbi baldaŭ novajn anojn por UEA. Via laboro estas vere subteninda, karaj amikoj. Kun elkoraj salutoj.

J.X.M. de COUTO, Coimbra.

... Mi ricevis la premion kiel subtenanto..., premio XIII, Libropakajo. Mi tre ĝojis pro la multaj kaj valoraj libroj, kiujn la pakajo enhavis kaj petas vin akcepti mian plej bonan dankon. Post ricevo de la multaj kaj valoraj libroj ĉi-supre menciitaj, mi rezignas koncerne la ricevon de premio por frupago. Altestime kaj samideane,

Otto ROESEL,
MS 5433, Boras (Sved.)

... nu, la belaj premioj, kiujn mi hodiaŭ frumatene ricevis ekĝojigis mian knabinan koron kaj feliĉege legante, babilante kaj rigardante mi krome kisetis la emblemon de Esperanto. Kaj mi daŭrigos senlace la varbadon. karaj altŝatataj verdstelanoj...

F-ino Minuŝka MANTEL, Wien.

... mi ĝojas sciigi vin ke mia edzino, konsentas fariĝi subtenanto de UEA por la nuna jaro.

L. A. CHURCHILL, D en Derby.

Ricevinte vian alvokon mi decidis fariĝi subtenanto ankaŭ ĉi tiun jaron.

Fernando ZACCHE, D en Mantova.

... alpagas 135 Frk. por esti Subtenanto. Vivu UEA !

S-ino Alex. L. BOLSIUS.

... Por montri mian fidon en la UEA kaj ĝiaj oficistoj mi sendas per poŝtmandato donacon de 20 Dolaroj. Mi tre esperas, ke nia Asocio sukcese travivos la unutempan malfacilajon.

Henry W. HETZEL, Philadelphia.

Gajaj Horoj

Spritaĵoj, anekdotoj, ŝerodemandoj,

preseraroj vortludoj.

RM 0,50 (sfr. 0,60) aŭ 2 respondkup.

Gajaj Vesperoj

Decaj bonhumoraĵoj.
Konsiloj por gajaj grupkunvenoj kaj kursoj.
Multaj esperantaj ludoj.
RM 1.— (sfr. 1,25) aŭ 4 respondkup.

La bonhumoraĵoj amuzas ĉiun esperantiston.

Grupoj, kies anoj uzas la libron : « Gajaj Vesperoj » (kaj ankaŭ la libreton : « Gajaj Horoj ») arangos gajajn, sed tamen tre instruajn vesperojn. La grupanoj restos fidelaj. Same partoprenantoj de progresintaj kursoj lernos kun plezuro.

Mendu ĉe : C. Walter, Berlin W 10, Hohenzollernstr. 11 (Germ.) Poŝtĉeko : Berlin 85766.

Tra la Mondo Esperantista

Venu Parizon !

Eble tiu surgrimpo sur la Triumfarkaĵon incitos vin suprenleviĝi ĝis la supro de la *turo Eiffel*, tiu giganta fera monumento, alto 300 metrojn.

Kontraŭ ĝi, trans la rivero Seine, jen la palaco Trocadéro, kiu entenas 6.000-lokan festsalonegon kun du muzeoj. Sed jen sur la rivero mem, tiuj ŝipoj rapidaj !... Per tiuj « muŝ-ŝipoj » vi povos fari tre agrablan ŝippromenadon laŭlonge de la rivero.



La librovendistoj (bouquinistes) sur la kajo de la Seine.

Kio estas tiu impona konstruaĵo ? — Tio estas la tutmonde fama palaco Louvre, antaŭe restadejo de la francaj reĝoj kaj imperiestroj; nun, la plej granda ĉiahistoria, ĉiaarta muzeo. Vi certe vizitos ĝin; same vin allogos muzeo Carnavalet (pri pariza pasinto), Cluny (antikvaĵoj), Guimet (orientaj religioj), Invalides (militaj historiaj aferoj) — en ĝi vi trovos la imponan tombon de Napoleono — Luxembourg (skulptaĵoj kaj pentraĵoj), k.t.p.

Kiam vi forlasos la palacon Louvre, estimata samideano, tre atentu pri via amata edzino, ĉar tute kontraŭe estas tre allogaj magazenoj... Mi ne detale parolu pri la magazenoj « *Louvre* », « *Printemps* », « *Galeries Lafayette* », k.t.p. : niaj amindaj samideaninoj ja scias jam, ke en ili oni trovas ĉion, kion eleganta virino dezirpovas.



Trocadéro.

Jen granda urbarterio : strato de Rivoli, kiu kondukas nin al « *Hotel de Ville* » (centra urbdomo), kiu staras sur la loko kie staris en 1357 la « domo kun kolonoj », tiama urbdomo. Interesaj salonoj estas viziteblaj. Ni povos daŭrigi longatempe irante de « *Conciergerie* » (prirevoluciaj memoraĵoj) ĝis « *Petit Palais* » (belartmuzeo), de *Panthéon*, ekspreĝejo kie nun dormas plej gloraj filoj de Francland0, al placo de Bastille kie estis la fama fortika malliberejo konkerita de la popolo je l' komenco de la Franca Revolucio (1789). Sur tiu placo nun staras alta bronza kolono kiu memorigas pri la sub ĝi ripozantaj mortigitaj batalintoj dum la revolucio de 1830.



La Urbdomo.

Ni promenadu ankaŭ subtere... mi ne aludas pri la subtera fervojo « Métro », kie vi estas tiel premegota ke vi nenian plezuron ricevos, sed vizitu la Katakombojn, tiuj eksaj gipsminejoj en kiuj nun intermiksiĝas tri milionoj da skeletoj kolektitaj el la eksigitaj tombejoj de Parizo. Vi eĉ povos kun viziti la kloakon de Parizo en speciala fervojeto.



La ĝardeno Tuileries, rue Rivoli kaj Sacré Cœur.

Tie mi haltas ! — Ja mi povus citi ankoraŭ multajn vidindaĵojn, sed mi povus samtempe tedi vin ! Mi do fine rediras al vi, venu ! Vi trovos kion ajn vi deziros, teatrojn, muzeojn, belajn monumentojn kaj preĝejojn. Vi povos gaje kaj grandplezure promeni sur la stratoj kaj bulvardoj (atentu la rapidegajn veturilojn kaj transiru la stratojn nur inter la najlolinioj) kaj en tre plaĉaj ĉirkaŭaĵoj de Parizo.

Venu do multaj al nia XXIV-a Kongreso, viaj francaj samideanoj vin atendas ! ELBE.

S. J. Ysselstein
Delegito de UEA
Schiedam

Schiedam, Majo 1932.

Publika letero al S-ro Onnen en Den Haag

Estimata Sinjoro Onnen,

Same kiel vi, ankaŭ mi estas malkontentulo, ĉar :

1. nia neŭtrala Esperanto-Movado ne estas unueca;

2. la organizado estas malforta, malkoneksa;

3. ni, unuopaj Esperantistoj pli malpli estas senpovaj, ŝanĝi tiun ĉi staton, ĉar niaj kongresoj nur estas parado-kongresoj, ...kongresoj sen rajtigitaj delegitoj.

Sed mi tute ne povas admiri viajn agadojn en kaj kontraŭ UEA, precipe ne vian agadon kontraŭ personoj.

Tiuj personoj, niaj gvidantoj, faras kaj faris erarojn. Kompreneble. Ĉiu, kiu laboras, faras ilin. Ankaŭ vi.

Sed la tasko de la gvidantoj de UEA estas tiel giganta, ke mi havas grandan admiron pri ili. UEA estas pli multnombra ol ekzemple la Ligo de Nederlandaj instruistoj. Kaj tiu ĉi Ligo havas tri salajratajn estraranojn kaj kelkajn konstantajn oficistojn. En la UEA oficejo nur 5 homoj deĵoras.

Pripensu tion bone kaj vi devos konsenti kun mi, ke tiu stato estas terura.

Manko de mono estas la kaŭzo de tiu malĝoja stato. Kaj tion vi ne devas riproĉi al la gvidantoj, sed al ni, al la membroj.

« *Esti Esperantisto* » signifas : Oferi multon por povi atingi la celon. Multaj Esperantistoj ne komprenas tion. Multaj aliaj jam atingis la limon de sia povo, ĉar ili ne nur pagas la kotizon al UEA, sed ankaŭ tiun al aliaj unuiĝoj, kaj ankaŭ la abonon de diversaj gazetoj.

Ĉu ĉiu Esperantisto faras sian eblon ? Ĉu ĉiu faris sian devon ? Mi pridubas. Instruisto nederlanda kun jarsalajro de 3.600 guldenoj pagas al sia Ligo 36 guldenojn. ...Kiom li volas oferi por la Esperanto-movado ? Kiom por UEA, kiu bezonas, por povi taŭge labori, almenaŭ la samajn enspezojn, kiel la nomita Ligo ?

Ni Esperantistoj, ni laboru. Ni faru nian eblon por fortigi UEA. Ni oferu tiel multe kiel eble. Ni fariĝu subtenantoj. Ni donu kaj kolektu monon por pagi la kotizon de niaj senlaboruloj.

Laŭ mia opinio UEA estas la plej grava parto de nia movado. Ĝi nun trabaraktas malfacilajn tempojn, ...krizon, tiel teruran, kiel la mondo neniam spertis. Nian amon ĝi tial bezonas, nian fidelon, nian oferemon, nian persiston.

Kaj kion vi donis al ĝi ? Vi prenis martelegon kaj vi penas per ĝi malkonstrui nian plej belan konstruaĵon. Vi kriegas de sur la anguloj de la stratoj : Burĝoj kaj kamparanoj, vidu kiel malbona estas UEA.

Estas, kvazaŭ vi konsilas al tiuj, kiuj estas ŝanceliĝemaj : Eksiĝu.

Estas, kvazaŭ vi laŭte krias al ĉiuj, kiujn ni esperas varbi por UEA : Haltu ! ne eniru !

Ĉu vi ne postulis de nia ĉefdelegito, ke li disdonu vian, UEA — malamikan broŝuron, al ĉiuj novaj membroj ?

Momente ni rajtas nomi per unu buŝo kiel danĝerojn al UEA, la krizon kaj vin.

Ne Sinjoro Onnen, tio ne estas la maniero plibonigi nian movadon.

« Sed mi donis argumentojn », mi aŭdas vin diri.

Mi respondas : Vi donis nenion. Viaj argumentoj ne klarigas al ni la momentan malprosperon de UEA.

Sincere mi demandas, ĉu krom vi, estas ankoraŭ 50 aliaj (50 el la 9.000), kiuj cerbumas pri la statutoj, pri la dika vualo inter anoj kaj estraro, pri ne zorga laborado de la gvidantoj, pri la financa kontrolo, pri ĉiuj tiuj « faktoj », kiujn vi prezentas en viaj plendoj.

Estas do tute neeble, ke pro viaj plendoj, centoj da anoj eksiĝis. Sed en la estonteco estas eble, ke kelkaj uzos viajn plendojn kiel argumentojn por eksiĝi. Ĉar vi instigis ilin, Vi malfermis iliajn okulojn.

Sed, ...ĉu vi *vere* faris tion ? Ĉu vi juste agis ? Tion mi pridubas. Tion mi eĉ neas. ...Mi ne intencas diri, ke vi estas maljusta. O ne, tute ne. Mi scias, ke vi estas tute sincera homo, estimata de mi kaj de multaj aliaj. Sed mi demandas al mi : Kial vi ne povis kunlabori kun la UEA-gvidantoj, kiam vi estis nia ĉefdelegito, kaj kial estas la kunlaboro inter nia nova ĉefdelegito, Sinjoro Telling (diligenta kaj akurata same kiel vi), tiel perfekta ?

Kaj mi demandas al mi : Kial vi postulas de la laborantoj en la UEA-oficejo la neeblon ? Kial vi volas ekspluati ilin ? Al ĉiu prudenta homo devus esti klare, ke viaj plendoj nur povus esti funde forigataj, se UEA havus pli da mono kaj pli da oficistoj.

Unu el viaj plendoj mi flankenlasis, nome tiun pri la gazeto « Esperanto », la ununura el viaj plendoj, pri kiu la membroj ĝenerale ankaŭ pensas iam kaj tiam.

Vi estas prava, ke Heroldo estas pli alloga ol « Esperanto », sed vi forgesas 2 aferojn :

1. « Esperanto » estas organo de Asocio kaj do devas enhavi materialon, kiun Heroldo povas eviti.

2. « Esperanto » malfacile povas aperi en la alloga formato de Heroldo.

« Jam depost 6 jaroj oni povas konstati timigan malkreskon », vi ekkrias. Kaj vi aldonas : « Estas mistifikaĵo atribui tion al la nuna mondkrizo ».

Ŝajne vi pravas. Sed nur ŝajne :

1. La nunan mondkrizon antaŭiris pli malpli gravaj krizoj en diversaj, jam de la mondmilito suferantaj landoj.

2. Vi tute ne pensas pri SAT, pri la Asocio, kiu dum la jaroj 1925 kaj sekvintaj, forprenis multajn el niaj membroj, pri la Asocio, kiu instigis siajn anojn, serĉi novajn adeptojn en niaj vicoj.

Ĉu vi scias, ...tio interkrampe ...ke SAT, kiu post 1925 (mi ne precize scias kiam), forte kreskis kaj atingis nombron de 7.000 membroj, poste terure malkreskis kaj la 30an de Junio 1931 nombris nur 2.755 anojn ?

Tiu malkresko parte estas la rezulto de internaj malkonsento kaj malpacoj, sed precipe pro la nuna, tiel *longdaŭra* krizo.

Tio estu al ni instruo, ...al ni kaj al vi. Nun ne estas tempo malpaciĝi pri statutoj kaj malhavaĵoj de niaj laboregantaj gvidantoj. Antaŭ ĉio ni nun premu la dentojn unuj sur la aliajn por teni tion, kion ni havas kaj por konservi nian belan UEA.

S. J. YSSELSTEIN.

PERADA OFICEJO " PODEM "
en T. Pazarĝik, Bulgarujo

PERAS ĉiujn negocojn komercajn, entenante importon kaj eksporton de fruktoj.

DONAS plej bonajn referencojn, havigas informojn pri ĉio komerca en Bulgarujo. Por ĉio kio rilatas Bulgarujon turni vin fideme al Perad-oficejo *Podem*, T. Pazarĝik.

La oficejo disponas je propra gazeto kaj posedas specialan reklam-servon.
Korespondas en Esperanto, Germane kaj France.

* Naciaj Kongresoj *

Brita en Southport

Laŭ invito de lia urbestra moŝto la 23a Brita Esperantista Kongreso okazis en Southport je Pentekosto. Aniĝis 300 gesamideanoj, kiuj, kiel gastoj de la urbestro ricevis senpagajn biletojn por la tenis — kaj golf ludejoj, subĉiela banlago, orkestrejo.

Sabaton posttagmeze okazis eduka kunveno ĉe kiu F-ino Edwards el Bishop Auckland kaj F-ino Hogg el Ellesmere Port raportis pri siaj spertoj en la instruado de la lingvo en siaj lernejoj. F-ino Edwards instruas Esperanton po duonhoro ĉiutage. F-ino Hogg po unu horo ĉiusemajne, kaj ambaŭ raportis pri bonegaj rezultatoj. Sekvis ĝenerala diskutado.

En la vespero la urbestro bonvenigis Esperante la kongresanojn en la urbdomo Birkdale kie okazis tre ŝatinda koncerto. Kantis F-inoj Edwards, Lyons kaj Livingstone (Southportaninoj) kaj S-ro Harvey (Edinburgo). F-ino Iddon anstataŭis S-ron Merchant (kiu ne ĉeestis) ridigante la ĉeestantaron per deklamo de fe-rakontoj. La Erika Rolantaro — S-ino de la Bruyère, F-inoj Renée, Angèle Sales kaj F.-M. Clark, S-roj G. W. Goodall kaj J. W. Chambers — prezentis la teatraĵon « La Vilao de l'Amo ».

Dimanĉan matenon kunvenis la UEA anoj, kaj tuj poste la kongresanoj fotografiĝis en la urba orhestrejo. Sekvis la komuna lunĉo ĉe la « Prince of Wales » hotelo, kaj poste parolis S-ro Robertson, gratulante F-inojn Iddon kaj Kay pro la aranĝoj. De ĉie alvenis bondeziroj por la sukceso de la kongreso. Ĉi tiujn laŭtlegis anino de la L.K.K. Je la tria p.t.m. Esperanta Diservo okazis en Christ Church, Prof. W. E. Collinson el la Liverpoola Universitato predikis pri la « Turo de babelo ». Post Diservo oni marŝis al la militmemoraĵo, kien S-ino Blaise metis kvinpintan florkronon surhavantan la vorton « Esperanto ». Je la sesa horo kunvenis anoj de la Unuiĝo por la Ligo de Nacioj. Je la sepa kunvenis lokaj reprezentantoj kaj grupaj sekretarioj.

Lundan matenon okazis la laborkunsido de la BEA en la urbdomo, Birkdale. S-ro Robertson parolis kaj S-roj Butler kaj Goldsmith respondis al demandoj pri la raportoj. La financa raporto estis akceptata, kaj malgraŭ kutima deficito, la lastaj tri monataj montras malpli gravan aferstaton. S-ro Goldsmith raportis ke la garantiata monsumo ne estas sufiĉa, kaj responde al lia elokventa peto, pluaj 44 funtoj sterlingaj estis garantiataj de la ĉeestantaro.

Je la 8.30 okazis la plej grava el ĉiuj kongresaferoj : la Balo. Lia urbestra moŝto bonvenigis la delegitojn en la Cambridge Halo, kie li gastigis ĉirkaŭ tri cent personojn. Oni aranĝis ĉion lukse kaj la halo aspektis belege. La dancorhestro preskaŭ perdiĝis inter floroj kaj verdaĵoj. Senlimaj trinkaĵoj kaj manĝaĵoj estis haveblaj, kaj la tuta afero estis treege memorinda sukceso. Ĵus antaŭ noktomezo la urbestro denove alparolis siajn gastojn. S-ino Blaise, kiu antaŭ dudek jaroj instruis la unuan Esperantan kurson en Southport respondis dankante lin pro la bonaj kaj luksaj aranĝoj por la komforto de la kongresanoj. Ŝi diris ke ĉi tiu estas la plej feliĉega el ĉiuj kongresoj, kaj ke la gastamo de la urbestro estos ĉiam rememorata. S-ro Curry el Burnley subtenis, kaj asertis ke neniu urbo tiel bonkore kaj sindoneme gastigis kongreson. Finiĝis la dancado je la unua horo.

La kongreso finiĝis kaj la multa laboro de la L.K.K. estis kronita per brila sukceso. — (F-ino Clayton)

Sveda en Eskilstuna

Sveda Esperanto Federacio havis dum pentekostaj tagoj sian jarkunvenon en Eskilstuna. La jarkunveno malfermiĝis en la vespero antaŭ la pentekosta tago de la prezidanto en la Federacio, redaktoro P. Nylén, kiu bonvensalutis la ĉeestantojn. Partoprenis 125 gesamideanoj, inter ili kelkaj eksterlandanoj.

Kiel prezidanto de la jarkunveno elektiĝis S-ro T. Julin, Stockholm, kaj kiel Vicprez. S-roj Einar Dahl, Uddevalla kaj K. Söderberg, Uppsala. Kiel sekretario elektiĝis S-ro Frithiof Hedberg, Eskilstuna, kaj kiel Vicsekr. S-ro Nils Thärnström kaj Folke Pettersson, Eskilstuna.

En la estraron elektiĝis kiel Vicprez. rektoro Sam Janson, Lidingö, sekr. Instruisto E. Malmgren, Stockholm. Vicsekr. Redaktoro B. Ericsson, Stockholm kaj kiel kasisto aktuario Erik Malmkvist, Appelviken. Kiel reviziistoj elektiĝis Ad. Larsson. kaj inĝeniero Rud. Persson, Stockholm. Kiel delegito en Sveda Esperanto-Instituto elektiĝis Red. H. Halldor, Stockholm.

Oni decidis situigi la venontan jarkunvenon en Norrköping.

Post parolado de Red. P. Nylén finiĝis la kunveno.

Germana en Chemnitz

El ĉiuj partoj de Germanujo venis reprezentantoj de la grupoj de Germana Esperanto-Asocio al la industria urbo Chemnitz. La kongreso komenciĝis kun la tradicia salutvespero en salono de luksa hotelo « Chemnitzer Hof ». Sen granda programo la ĉeestantoj tamen bonege amuziĝis kaj interkonatiĝis laŭpove. La plej alta punkto de la kongreso estis la solena malfermo en la festsalonego de la « *Akademio por tekniko* », kiun la ŝtata administracio disponigis al la kongreso. En ĝi post salutaj vortoj de la P. de L.K.K., Prof. Wicke, la P de GEA Postrat Behrendt malfermis la kongreson. La urbestro de Chemnitz S-ro Alart kaj la direktoro de la Akademio bonvenigis la kongresanojn, kamerhoro de la Chemnitz'a Instruista kantistaro kantis popolkantojn en E-traduko de P. Bennemann kun subtila prononcado kaj muzike kun belega sukceso. Sekvis la ĉefa kaj festparolado de supera distriktlernejkonsilisto D-ro Kraner, Dresden, pri la temo « Ĝojo, ĝojo pri Esperanto ». La paroladanto priskribis en konvinkiga maniero kaj sub streĉa atento de la kelkcenta partoprenantaro, kio kaŭzas al li kaj al ĉiuj Esperantistoj ĉiam novan ĝojon pri Esperanto : 1e la celkonforma beleco de la lingvo Zamenhofa, 2e la konstatebla kresko de ĝenerala prilingva ekkono per la okupiĝo pri Esperanto, 3e la ebleco de memstara lingvo-kreado kaj 4e la plenumo de diversaj taskoj rilate al la disvastigo de Esperanto kaj Esperantismo inter la homoj.

Riĉa aplaŭdo montris la konsenton de la aŭdantaro kun la ne-Esperantistaj gastoj, sed ankaŭ multaj el la Samideanoj lernis multon el tiuj pravaj kaj kun oratora lerteco prezentataj tezoj. Riĉa aplaŭdo montris la konsenton de la aŭdantaro kun la paroloj de la oratoro. Sekvis ankoraŭ salutoj de D-ro Wicke nome de *Germana E-Instituto* (anstataŭ Prof. Dietterle. kiu nur la duan tagon venis al la kongreso), de S-ro Behrendt nome de *ICK* kaj de S-ro Karsch, Dresden, nome de *UEA,* tiam komuna kanto de la himno finigis la vere belan solenon, pri kiu la lokaj gazetoj tre kontentige raportis. Fotografado, komuna tagmanĝo — kiel kutime kun bonhumoraj tostoj — estis sekvataj de la unua laborkunsido. La estraro de GEA donis sian jarraporton, kiu montris, ke la asocio eĉ dum la nunaj mizeraj cirkonstancoj sukcesis plenumi siajn taskojn, kasraporto estis konsentata kaj poste la laŭstatute el la estraro eksiĝantaj S-roj Behrendt, Vogt, Markaŭ kaj Brüning (ne la kanceliero) reelektataj de la kunveno. Aliĝe al tiu unua laborkunsido de GEA okazis *kunveno de UEA,* en kiu S-ro Karsch raportis pri la nuna stato de la asocio, klarigojn al la alvoko de la komisiono en la Aprila numero de « Esperanto », kaj speciale rifuton koncizan al la pamfleto de S-ro Onnen en Hago, kiun tiu disvastigis inter la E-istaro. S-ro Karsch substrekis, ke UEA bezonas por efika laboro kaj sukceso daŭra malgraŭ kriza tempo la plenan fidon de la Esperantistoj. Lia parolado trovis viglan konsenton de la kunvenintaro. La *konsilantaro de GEA,* kiu jam kunsidis sub sia P., S-ro Schmalzl Weiden. sabaton dum 4 horoj, daŭrigis siajn laborojn ankaŭ en tiu vespero ĝis la 23a kaj tiel preparis bone la du laborkunsidojn de lundo, dum la aliaj Samideanoj amuziĝis en diversaj kafejoj k.t.p. de la gastama urbo. Lundon matene la *dua laborkunsido* okazis en E-lingvo, oni aŭdis raportojn de Prof. Wicke, Chemnitz, pri *E kaj nacio,* kaj de lernejestro Hahn, Gohlis-Dresden, pri *Praktika E-laboro en* lernejo kaj grupo. Ambaŭ parolantoj sukcesis veki viglan E-diskutojn. Daŭriĝis poste la diskutoj pri diversaj *proponoj* direktitaj al la kongreso, sekve de ili decidate, ke *Germana Esperantisto* restu la *oficiala organo de la asocio,* ke la *kotizo estu iom reduktata* de post 1. 7. 32, kaj ke, por diskuti *problemojn organizajn,* oni komisiu 7 Samideanojn, kiuj raportu al la estonta kongreso. GEA elektis por tiu tasko S-rojn Schmalzl, Weiden, Habellok, Berlin. D-ro Vogt, Stuttgart, Epstein, Hamburg, Naumann, Grossenhain, Münz, Berlin, Karsch, Dresden. En la *fina laborkunsido* lundo ptm. oni aŭdis la raporton de la diversaj *laborfakoj de la konsilantaro de GEA*, el kiu evidentiĝis multa silente farita laboro de la pasinta jaro. Finiĝis la oficiala kongreso kun invito de S-ino Gernsbacher, Köln, por la tiea Universala Kongreso, en kies kadro ankaŭ okazos la venontjara Germana E-Kongreso. Malgraŭ provoj de malgranda opozicia grupo, la Chemnitza jarĉefkunveno aprobis la labormanieron de la GEA estintan kaj estontan

La *Unuiĝo de Germanaj E-Instruistoj* kunvenis la unuan kongrestagon en aparta bonvizitata kunsido, priparolis siajn aferojn kaj aŭdis raporton de S-ro Haubold, Riesa, pri la nun dekjara organo de la E-instruistaro « *Internacia Pedagogia Revuo* ». Ankaŭ tiun kunvenon ĉeestis oficialaj gastoj de urbo kaj lernejo de la kongresloko.

Jugoslava en Brod n. S.

Spite la nuna situacio partoprenis tiun ĉi kongreson multaj esperantistoj el ĉiuj partoj de Jugoslavio. La malfermo okazis en « *Hrvatski Dom* » (Kroata domo). Ĉeestis pli ol 300 personoj. S-ro Mavro Ŝpicer, kroata kaj jugoslava pioniro de Esperanto, konata verkisto, estis elektita kiel honora prezidanto.

Dum la laborkunsido oni informis pri la fina akcepto pere de la ministerio de internaj aferoj, de la statuto. La sidejo de la Jugoslava Ligo Esperantista nun estas en Beograd. Kiel estraron oni elektis : D-ro J. Stefanĉiĉ, Prezidanto; D-ro M. Bogoviĉ kaj D-ro Kraus, Vicprezidantoj; J. Zupanĉiĉ, sekretario; L. Probil, kasisto; Fr. Homar, redaktoro; Arkivisto : D. Jovanoviĉ.

Inter la faritaj proponoj estis tiu fondi Jugoslavan Esperanto-Instituton. Pri eldonota gazeto la estraro estas komisiita fari antaŭe esplorojn laŭ kiuj oni poste ekagu. Estonta kongresloko ne estas dinita sed oni deziris ke Beogrado akceptu.

Svisa en Sankt Gallen.

Malofte la svisaj esperantistoj kunvenas en norda aŭ orienta parto de la lando. Por la unua fojo oni kunvenis en Sankt Gallen, la centro de la brodajindustrio. Vigla esp. vivo ekfloris, dank' al la kurso de Andreo Cseh kaj Ge-sinjoroj Morariu kaj la Nova Esperanto-Klubo akceptis la taskon aranĝi la svisan kunvenon.

Sabate la 21/5 okazis ekzamenoj laŭ la bona malnova kutimo. Prezentiĝis al ekzameno por lernado 7 personoj kiuj sukcesis :

Vespere amuziga kaj distra kunveno en tia aranĝo ankoraŭ ne spertita inter la sobraj svisoj. Plena salono, vigla grupo junula, novaj vizaĝoj kaj nova entuziasmo. Eĉ la kantado de la himno, kiu malofte estas korekte kantata sukcesis bone. Grupa orkestro ludis. Verdevestitaj samideaninoj dancis baleton. Kaj fine dancado.

Dimanĉe matene aŭtobusa ekskurso tra la valo kaj montoj de tiu ĉi ĉarma urbo. Precize je la naŭa horo komenciĝis la kunveno en la Salonego de la Granda Konsilantaro, inda kunvenejo de la Kantona parlamento kun remburitaj seĝoj, blazonoj, kaj fluo de soleneca aero kiel decas por registaro. Longa tagordo metode prilaborita sub la prezidanteco de S-ro Ed. Stettler. Raporto pri Cseh kursoj, financoj, ĝenerala stato de la Svisa Esperanto-Societo, elekto de nova ĉefgrupo unu post alia sekvis kaj je la unua posttagmeze la tuta tagordo estis finita. Decidoj :

1. Aprobi protokolon de la lastjara kunveno en Solothurn.
2. Elekti S-ron Andreo Cseh kiel Honoran Membron de SES.
3. Transdoni la gvidon de SES al Sankt Gallen (ĉefgrupo) kun kora danko al la ĝisnuna Centra Komitato : S-roj Ed. Stettler, J. Schmied, D-ro Spielmann, M. Liniger kaj A. Vonlanthen por ilia sindona laboro dum 4 jaroj.

D-ro Maeder, prezidanto de la Nova Esperanto-Klubo, kaj nuna prezidanto de la SES dankis al ĉiuj kiuj venis malgraŭ la situacio (kaj altega tarifo fervoja) kaj promesis konduki la ŝipon de SES kun sindono kaj fervoro al fiksita celo : 1.000 membroj. La venonta svisa kunveno okazos verŝajne en Neuchatel.

Ĉe la bankedo en Kaufleuten (domo de la komerca societo) la registaro delegis reprezentantojn kiuj alparolis la kunvenintaron. La urbo helpis al la organizo de la kunveno per donaco de 200 Frk. Kiel gasto ĉeestis S-ro Schade el Vieno.

Posttagmeze kunveno de UEA prezidis S-ro Jayet, Honora membro kaj Delegito en Morges. La Direktoro de UEA skizis la nunan staton. Sekvis vigla diskutado precipe pri la atakoj de S-ro Onnen kontraŭ la estraro, malaprobitaj entute kun fidesprimo al la gvido de la Asocio.

Spite montritaj malfacilajoj la vizito de la Svisa kunveno estis tre bona, pli bona ol oni rajtis atendi. Al la Sankt Gallen-anoj, simpla konstato : Vi bone meritis por la afero. Koran dankon simpla konstato: Vi bone meritis por la afero. (*Alobrogo.*)

Inaŭguro de la Strato de D-ro Zamenhof en Barcelona



La reprezentantoj de la Barcelonaj Esperantistaj Societoj ĉe la podio antaŭ la marmortabulo. De maldekstre dekstren (la kvina) S-ro F. Amat urbkonsilanto kaj reprezentinto de la Urbestro (la sesa) S-ro Gili Norta organizinto kaj animo de la festo (la sepa) (S-ro Alberich Jofré prezidanto de Kataluna E.-Federacio.

Okaze de la dek-kvina datreveno de la morto de D-ro Zamenhof, niaj samideanoj en Barcelona solene inaŭguraciis la 14-an de Aprilo novan straton kun la nomo de la majstro. Tiu festo kunvenigis la grupojn kun la standardoj kaj grandan nombron da esperantistoj.

Ĉe la malkovro de la strattabulo faris paroladojn S-roj S. Alberich Jofrè, Delfi Dalmau kaj Marian Solà. En la nomo de la urbestro parolis S-ro F. Amat. Li promesis, ke la urbestraro helpos la Esperanto-movadon ĉar ĝia celo estas laŭdinda el ĉiuj vidpunktoj.

La propagando por la nova strato estis subtenita de ĉiu enurba grupo sub la gvido de Kataluna Esperantista Federacio kaj de fakestro S-ro Joan Gili Norta.

Post la inaŭguracio okazis festeno. En ĝi partoprenis la plimulto de la prezidantoj de la grupoj en Barcelona, la estraro de Kataluna Esperantista Federacio kaj multaj pioniroj.

Antaŭkongreso

Lyon 28-29 Julio 1932

Helpe de la Kunlaboro de la Lyon'aj Esperantistaj Societoj, la Lyon'a sekcio de U.E.A. organizas la 28. kaj 29. de julio, antaŭkongreson, al kiu estas kore invitataj ĉiuj Esperantistoj, kiuj vojaĝas al la Pariza Kongreso.

Organiza Komitato: Honora Prezidantino: S-ino Farges, Eks-Delegitino de UEA.

Prezidanto: S-ro E. Borel, Delegito de UEA, 1, quai C. Bernard, Telef. Parmentier 08-29.

Vic-Prezidantoj : S-ro G. Pouchot, administranto de S.F.P.E., sekretario de Lyon'a Esperantista Amikaro.

S-ro Courtinat, Delegito de UEA, en Bellerive (Allier).

Kasisto : S-ro Mage. Sekretario : S-ro Richard Levin. Helpsekretario : S-ro Bourgeois.

Programo. — Ĵaŭdo 28. Julio : 20 h. 30 : Amika Kunveno en la ĝardenoj de kafejo « Chalet du Parc » en Parko « Tête d'Or ».

Vendredo 29. Julio: De 8 ĝis 10: Kongresa Kunveno: Raportoj

Je la 10.: Ekiro de Komerca Palaco por viziti la monteton Fourvière reveno tra malnova kvartalo St-Jean, kie okazis la katastrofo en novembro 1930.

De la 14. ĝis la 18. — Generala vizito de la urbo. — Du gvidotaj grupoj : unu en aŭtoĉaro, la alia piede kaj tramvoje.

Akceptejo : Ĉe la loĝoficejo de la Foiro (Bureau de Logements de la Foire), en aparta pavilono apud la norda elirejo de la Stacidomo Perrache.

Kongresa Sidejo : « Palais du Commerce », Place de la Bourse.

Kotizo : Aktiva membro : 20 francaj frankoj. Simpla membro : 10 francaj frankoj. (Tiu lasta estas favora prezo por junuloj, familioj, malriĉaj samideanoj, k.t.p.)

Vizito de la urbo en aŭtoĉaro : 12 frankoj.

Informoj. — Sin turni al la Sekretario : S-ro Richard Levin, Foire de Lyon, Rue Menestrier, Lyon (Telef. Burdeau 55-05).

Pagoj. — Oni bonvolu sendi la kotizojn kaj pagojn por vizito en aŭtoĉaro al la kasisto : S-ro Mage, Sekretario de C.R.C.I.A. 46, Rue de l'Hôtel de Ville. Telef. Franklin 36-05. Poŝtĉekkonto N° 157-48.

Ĉeĥoslovaka E-kongreso en Olomouc

ESPERANTO ARBO

MEMORŜTONO AL ESPERANTO

Dum la ĉeĥoslovaka kongreso en Olomouc organizita de la Moraviaj Esperanto-Pioniroj estis lokigita memorŝtono kun teksto antaŭ Esperanto-Arbo. La partopreno al la kongreso estis tre bona.

(Ĝis 11.6. ni ne ricevis la promesitan raporton, Red.)

Italujo

La Itala Kongreso de Esperanto okazos en Torino de la 26a ĝis 29a de Julio. Kutima tagordo de la Itala Federacio, plie ekzamenoj de la Itala Instituto. Ekskurso al la alpa vilaĝo Courmayeur (Cortemaggiore) la perlo de la Aosta valo, ĉe la itala flanko de la Monto Blanka. Eksterlandanoj estas kore invitataj. Oni anoncu partoprenon al : Esperanto Centro Itala, Galleria Vittore Emanuele 92, Milano.

Kursoj : Finis la kursoj en la reĝaj lernejoj en Brescia. En Venezia la kursoj daŭras kun bona sukceso, en la mezgradaj ŝtataj lernejoj.

Elektoj : S-ano Facchi ree estis elektita prezidanto de la loka societo en Brescia. Oni esprimis dankon al la Faŝista kultura intstituto en tiu ĉi urbo ĉiam favore subtenante nian klopodon.

En Romo la grupo elektis sian prezidanton en Profesoro Bruno Migliorini, nuntempe ĉefredaktoro ĉe la fama enciklopedio itala Treccani.

Resumis laŭ informoj de la Delegito
por eksterlando de la Itala E. Movado.

Malaja-landoj

En Singapore S-ro Gilliam Ching Chou, D de UEA starigis vesperan kurson en lernejo Daŭ Min. Deko da lernantoj. Bulteno « Verda Ondo » eldoniĝas kaj eliris jam unu numero.

En Ipoh oni fondis Perankan Esperanto-Instituton. Aliĝis pli ol 50 ĉinoj. Kurso gvidata de S-ro Houchio, ano de UEA. Por interesigi la publikon al E, S-ro Houchio tradukas en ĉinan lingvon verkojn en Esperanto kaj aperigas en ĉinaj taggazetoj.



Grupo de indiĝenaj kursanoj en loko Balikpapan (Borneo)
Kurso gvidita de S-ro D. M. Pot, D de UEA.

Portugalujo

BARREIRO. — Saldanha Carreira paroladis en Teatro Cine-Barreirense pri la temo « Esperanto — lingvo de la Radiofonio », proponante ke la parolado estu prezentota tezo al la 1a Kongreso Nacia de Radiotelefonio, organizata de la portugala jurnalo « O Seculo ». Centoj da personoj kiuj ĉeestis varmege aplaŭdis. La konkludoj de la tezo aprobas tiujn de la Projekto-Favrel al la proksima Internacia Kongreso en Madrid. Oni prave pensas ke en du-tri jaroj la tuta popolo de Barreiro, kies plej multo konsistas el laboristoj, estu esperantigitaj. La fervojistoj en tiu-ĉi urbeto viglege laboras.

COIMBRA. — S-ro J.X.M. do Couto, helpata de samideanoj Lemos kaj Matias, grandege propagandas per paroladoj en portugala kaj angla lingvo, per la jurnaloj tieaj kaj per ekspozicioj Esperantaĵaj en kelkaj el la ĉefaj butikoj de la urbo. Kiel la urbo estas sidejo de la Universitato, la propagando en la profesoraj rondoj estas vere trafa kaj S-ro Couto ne laciĝas. Li mem informas ke li kaptas ĉiam la okazon por varbi al la ideo novajn samideanojn : en la vagonaro, ĉe la stacidomo, en la tramveturiloj, k.t.p. La nombro de esperantistoj kiuj portas Esperanto-insignojn konstante kreskas.

TRAMAGAL. — S-ro Rufo Antonio Lopes, malnova esperantisto kaj Delegito de UEA, gvidas kurson. Pro liaj klopodoj oni jus malfermis « Tramagala Esperanta Grupon ».



Internacia Polica Ligo

Oficiala Informilo

Ĉu ekzistas homo, kiu ankoraŭ nenion aŭdis pri nia majstro Zamenhof, pri lia admirinda kaj fenomena kreado, pri lia heroa batalo kaj oferema strečado realigi kaj efektivigi la planon : alporti al la homaro tutmonda profundan interkomprenigilon per uzado de helplingvo Esperanto ?

Milionoj da homoj scias pri Esperanto, studis esencon kaj tendencon de la helplingvo, ekkonante benon kaj utilon el ĝi por la tuta homaro.

Do ni intencas, speciale skribi pri la temo :

Esperanto en polica servo.

Dum la XV-a Kongreso en Nürnberg 1923, Esperantistaj policistoj el 6 diversaj landoj fondis la Tutmondan Polican Ligon, laŭ iniciato de Sinjoro de Marich, Budapest. Kiel gvidanton de la Ligo oni elektis S-ron de Marich, kiu nomiĝis ĝenerala direktoro. Iom post iom S-ro de Marich forlasis la principojn de la ligo kaj agis tute memvole. Li ne nur akceptis neesperantistajn policistojn, sed ankaŭ fondis pliajn fakajn ligojn profesiajn. Li celis unuigi ĉiujn kune kun la anoj de la Tutmonda Polica Ligo en *Tutmonda Ligo de la Ordo*. Li emis *ordigi la Ordon* kaj fine atingis ĥaoson kompletan. Dum varbado li uzis fantaziajn statistikojn pri miloj da membroj kaj sekretarioj, kiuj efektive ne estis anoj de la « Ligo de la Ordo » kaj de la « Tutmonda Polica Ligo ». Li enregistris kiel anojn, eĉ personoj kiuj neniam deklaris aliĝon, sed nur komencis lerni la lingvon Esperanto. Li daŭre eksperimentis per novaj provoj laŭ subitaj ideoj.

Li ankaŭ eldonis la revuon « La Policisto » kaj ricevis la kotizojn por pagi la kostojn de la eldono. Anstataŭ nur promesi aperon laŭeblan, li daŭre certigis, ke la revuo aperos monate. Li promesis multegon kaj plenumis nur etegon. Malgraŭ promesoj kaj certigoj, la revuo aperis neregule laŭ volemo de S-ro de Marich, ĉiujare nur kelkfoje ĝis fine ĝi malaperis. S-ro de Marich intertempe transloĝiĝis al Nederlando. Post dujara silento li rekomencis eldoni novan revuon kun la sama titolo « La Policisto », sed maŝinskribita teksto. Li ŝajnigas plenan interkonsenton de la liganaro kaj postulas kotizon sen iu ajn ligestraro aŭ liganara demando pro interkonsento. S-ro de Marich kondutas kvazaŭ nenio okazis, kvazaŭ, ke la harmonio kun ligestraro kaj liganaro estas en bona ordo, ke la liganaro senproteste toleras dujaran silenton kaj neaperon de la revuo. S-ro de Marich daŭre eraris, sed neniam konfesas tion. Li emas al diktatoreco dume la spertoj pruvis, ke ligo sub lia gvido ne povas prosperi, ĉar mankas al li klara percepto pri celo kaj ebleco.

Multe da energio, tempo kaj mono estis perditaj per liaj faroj. Entuziasmo kaj espero paraliziĝis inter la anaro kaj la laboro ŝajnis esti tutvana. Tamen ankoraŭ vivis la ideo inter aro de fideluloj. Ili trovis helpon ĉe la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado kaj la Universala Esperanto-Asocio. Per konsiloj de Sinjoroj Kreuz kaj Hans Jakob iom post iom sukcesis reorganizi Internacian Polican Ligon el Tutmonda Polica Ligo.

Fidela al la ideo, kunligi la esperantistajn policistojn, vic-prezidanto, sinjoro Beier, direktoroj A. Pohle kaj Teuchner kaj ĉefkasisto A. Gräfe dissendis du mil alvokojn al ĉiuj liganoj por inviti ilin, fondi novan pli bonan ligon. La rezultatoj pruvis la senbazecon de la Tutmonda Polica Ligo laŭ ideoj de S-ro de Marich, Centoj de la enregistritaj anoj ekzistis nur sur papero. Respondoj ne alvenis. Ekster 50 anoj el Leipzig kaj apenaŭ la sama nombro de la iamaj anoj de la Tutmonda Polica Ligo el Germanujo kaj aliaj landoj, deklaris realiĝon al Internacia Polica Ligo.

Dum la 19-a Germana Esperanto Kongreso en Dresden, Pentekosto 1930, kelkaj anoj de nia Internacia Polica Ligo kunvenis, starigis provizoran statuton kaj diskutis pri diversaj ligaj aferoj ankoraŭ ne solvitaj. Laŭ la nuna statuto nur povas akiri la membrecon per skriba deklaro ĉiu funkcianta aŭ pensiita policoficisto kiel ankaŭ oficistoj de aliaj estraroj kun polica karaktero. Celoj de la Ligo estas :

a) Propagandi la lingvon Esperanto inter la policanaro tutmonda,

b) Kunligi la policanojn esperantistajn por progresigi inter ili la fakscion kaj la senton de la profesia solidareco internacie,

c) Komprenigi al la publiko la sencon de la polica laboro por solvi ĝin en harmonia interkonsento,

d) akceli la enkondukon de la lingvo Esperanto en la internacia polica servado de la kompetentaj estraroj.

Atentu precipe ankaŭ : 24 de la statuto : *Internacia Polica Ligo interkonsentas kun Universala Esperanto-Asocio pri reciproka interŝanĝo de servoj, laŭ ties statuto Art.* 14.

Per tia interŝanĝo de servoj la propagandebleco de nia ligo treege plivastiĝis. Delegitoj de UEA. en pli ol du mil lokoj de la tuta mondo senescepte estas pretaj helpi nian ligon laŭ ebleco. Laŭsperte ni povas konfirmi pri multe da helpo diversspeca pere de tiuj delegitoj.

Du vidpunktoj estas konsiderindaj pri enkonduko de Esperanto en polica servo :

1-e. Instrui kaj perfektigi funkciantajn policistojn en Esperanto kaj rajtigi ilin, porti sur la uniformo insignon, por marki ilin kiel esperantistajn policistojn. Tasko de ili estas : doni informojn al fremduloj vizitante la urbon de la deĵoranta policisto.

2-e. Enkonduki Esperanton en kriminala fako por persekuti krimulojn efike, post forigo de lingvaj malhelpaĵoj.

Bedaŭre ni ne povas raporti pri gravaj rezultatoj atingitaj ĝis nun. Do, nia ligo estas tute nova kaj la anoj ankoraŭ ne estas sufiĉe viglaj por pleneluzi la organizaĵon per praktika laboro. Ĉi tiu nur estas atingebla iom post iom, post longjara ekzistado. La nunaj anoj nur povas pretigi la vojon por la estonteco, por poste atingi interligon de ĉiuj policistoj tutmondaj. Nur tiam, kiam la plimulto de la policistoj en diversaj landoj konvinkiĝas pri la neceseco de internacia kunligo kaj internacia kunlaboro, nia ligo povas atingi rezultatojn, kiujn ni atendas, rezultatojn de vigla interkorespondado kaj interŝanĝo de opinioj pri diversspecaj aferoj. Nia ligo ĉefe celas atingi internacian kunligon aŭ eĉ tutmondan interligon de ĉiuj policistoj, nur perfekte prosperebla per uzado de komuna helplingvo. Nur uzado de tia komuna lingvo ebligas la forigon de ĉiuj malfacilaĵoj, kiuj kontraŭstaras ĉiun internacian organizon.

Depost kelkaj jaroj jam ekzistas interligo de policistaj ligoj en Eŭropo, inter policistoj de la landoj : Germanujo, Francujo, Belgujo, Holando, Aŭstrio, Danlando, Svedlando kaj Norvegio. Ĉi tiu ligo nur estas provizora inter la ligestraroj ne kompleta ligo de ĉiuj policistoj.

Ĉi tiu ligo uzas diversajn naciajn lingvojn por eluzi la ligajn laborojn.

Pro tio la reprezentantoj de ĉi tiu ligo jam decidis dum la lasta konferenco en Köln 1930, nepre favorigi la disvastigon de Esperanto inter la policistaro de siaj landoj, por pli poste akcepti tiun lingvon kiel internacian polican lingvon.

Por sukcesigi deĵorajn aferojn internacie, jam ekzistas Internacia Kriminalpolica Komitato inter la landoj : Aŭstrio, Germanujo, Italio kaj Francujo. Ankaŭ ĉi tiu Komitato ĝis nun uzas 3 diversajn naciajn lingvojn, la francan, germanan kaj italan, vidu la oficialan organon « Internacia Publika Sekureco ».

Ankaŭ la anoj de ĉi tiu Komitato, reprezentantoj de la registaroj kaj policestraroj, jam ekkonis la malfacilaĵojn per uzado de pliaj naciaj lingvoj, kiuj pli kaj pli komplikigos la laborojn speciale post aliĝo de pliaj landoj. Pro tio ankaŭ ĉi-tiu Komitato celas uzadi nur solan komunan lingvon estonte, ankoraŭ ne sufiĉe klara, ĉu akcepti Esperanton aŭ ne.

Estas ĝojiga fakto, ke la estro de ĉi tiu Komitato, la iama policprezidanto de Wien kaj poste vickanceliero, ministro de la eksteraj aferoj en Aŭstrio, S-ro D-ro H. Schober, apartenas al nia ligo kiel honora prezidanto. La reprezentanto de la Komitato por Germanujo, iama prezidanto de la tutsakslanda Kriminalpolico kaj nuna policprezidanto en Dresden, S-ro D-ro Palitzsch, nia honora ligaprezidanto por Germanujo, jam treege helpis nin, antaŭenpuŝi nian ligan kaj lingvan aferon. Same la reprezentanto de la Komitato por Holando, S-ro K. H. Broekhoff, polica ĉefinspektoro en Amsterdam, ano de Universala Esperanto-Asocio, montris kaj konfirmis sian volon, helpi nin, atingi nian celon, per aliĝo al nia ligo.

Nia ligo daŭre devas esti atenta, por atentigi la kompetentajn personojn kaj estrarojn pri la taŭga uzado de nia helplingvo inter rondoj de policistoj diverslandaj. Pro tio, praktikaj rezultatoj gravaj nur estas atingeblaj per pliaj laboroj.

Do ni ne kompetentas pri iu ajn ordona decido al oficiala enkonduko de Esperanto en la internacia polica servo. Pri tiu decido rajte nur kompetentas niaj estraroj, de kiuj ni estas subulaj servantoj.

Konsekvence de niaj profesiaj devoj ni tamen komprene devas diferencigi tiajn el niaj esperantistaj devoj. Laŭ tiaj ni klare komprenu ke niaj estraroj kaj registaroj el si mem ne estas personoj per iniciata forto. Ili plenumas iliajn taskojn nur laŭ instrukcioj, kreita de korporacioj ĉefe parlamentaj. Laŭ tio niaj estraroj el si mem ankaŭ ne povas decidi la enkondukon de Esperanto kiel oficialan polican lingvon. Por atingi tion estas nepre necese, instigado el persona korporacio nun prezentata de nia ligo.

Nepra supozo de tia instigado estas, ke ni havas en nia fako jam aron da personoj, kiuj bone scias nian lingvon kaj kiuj demonstracie propagandas ĝian uzadon per spertoj el la profesio. El tio rezultas, ke ĉiu ano de nia ligo devas kunhelpi por pretigi la vojon ĝis la atingo de nia celo.

Ju pli granda la anaro des pli granda nia influo kaj la efiko de nia propagando ĉe estraroj. Nur paŝo post paŝo estas atingebla la enkonduko de nia helplingvo en la polica servo.

Laŭ tio, samprofesiulo nur lernante nian lingvon amuze, ne plenumas esperantistan devon kaj ne taŭgas por niaj idealpraktikaj celoj. Esperantista samprofesiulo ne nur devas bone scii nian lingvon sed ankaŭ devas esti spertulo ĉiurilate. Li nepre komprenu, ke laboroj al idealaj celoj nur povas finsukcesi per faka kuniĝado kaj per kunhelpa laboro. Tion komprenante li ankaŭ plenumos sian devon, daŭre propagandi en la senco de nia celo inter samfakuloj, estraroj kaj registaroj. Vere konvinkita ano de nia ideo ankaŭ estas preta, oferi por ideala celo, ne murmurante pri pago de kotizo. Li certe ankaŭ komprenas, ke nenio estas progresebla sen nomo.

Do ĉiu helpu antaŭenpuŝi nian movadon. Sendu taŭgan materialon al nia liga redaktoro A. Pohle, Dresden, Johann Meyer-strato 6. b. por prilabori kaj finpretigi ĝin.

Perspektivo al Estonteco eble jam post jardeko.

1-e. Esperanto estu enkondukita kiel deviga fako en ĉiuj policfakaj lernejoj.

2-e. La oficiala organo de la Internacia Kriminalpolica Komitato : Internacia Publika Ŝekureco (Internationale Öffentliche Sicherheit) serĉ- kaj persekuta revuo, aperu esperantlingve.

3-e. La oficiala internacia interkomunikiĝo inter la policestraro dejore okazu per uzado de la helplingvo Esperanto.

Nur per tiamaniere favorigita disvastigo de nia helplingvo Esperanto inter la tutmonda policistaro ni povas atingi ĝian oficialan akcepton kiel internacia polica helplingvo. Per tiu akcepto ankaŭ nur estas solvebla la ĝisnuna multlingveca problemo, kiu grave malhelpas ĉiun veran kunlaboradon internacian ankaŭ inter la polico de ĉiuj landoj. Ni nepre farigu ĝin per uzado de Esperanto! Nur per komuna helplingvo Esperanto povas interligi policanaron tutmondan.

Esperanto kaj Radio garantias laŭracian persekutadon kaj pereigadon de la krimuloj en ĉiuj surteraj landoj.

⁂

Nia liganaro estu informita pri jeno:

Kaŭze de financaj malhelpajoj nia ligo ankoraŭ nunjare ne povas aranĝi kunvenon dum la nunjara Esperanto-Kongreso en Parizo. Tamen la Amikaro de Policanoj esperantistaj de Francujo kaj kolonioj aranĝos fakan kunvenon. Speciala reprezentanto de nia ligo, sinjoro Sprušanski, landa delegito de Ĉeĥoslovakujo, afable akceptis la komision, partopreni ĉi tiun kunvenon. Liganoj, kiuj krome partoprenos la kongreson, estas tutkore petataj, nepre partopreni ĉi tiun kunvenon. Nia ligo atendas, ke nia movado ricevas fortan impulson per tio.

Nia ĉefkasisto, sinjoro Gräfe, en Chemnitz, jene raportas pri la financoj el la jaro 1931. Laŭ tio nia ligo enspezis :

	Gmk
Saldo el 1930	3,89
Kotizoj	438,35
Aliĝpagoj	9,00
Enspezoj el vendado de ligaj insignoj	21,11
Entute	472,35

La elspezoj estas :

	Gmk
Abonpago al U.E.A.	268,00
Bindado de la revuaj kolektoj 1930 kaj 1931	3.90
Elspezoj de la redaktoro	15,00
Por varbartikola traduko el franca lingvo	8,00
Poŝtelspezoj de la direktoro, restsumo el la jaro 1930	71.55
Poŝtelspezoj el la jaro 1931	64.75
Poŝtelspezoj de la ĉefkasisto	2,09
Entute :	433,29

Laŭ tio restas saldo por 1932 de : .... Gmk. 39.06

Tutkore ni danku al nia fidela ĉefkasisto, kiu silente, kaj konstante laboris por nia ligo!

Nia alvoko « Al la Policistaro de ĉiuj landoj » estis multe tradukita kaj publicita en diverslandaj fakrevuoj kaj laŭŝajne bone efikos. Ne estas eble al ni, danki al ĉiu persone, kiu helpis ĉi tiun propagandon per sia traduko kaj plua laboro. Tutkore ni danku al ĉiuj helpantoj en nia movado!

P. TEUCHNER,
Kriminalinspektoro (pens.)
Admnin. Direktoro.

A. POHLE,
Kriminalkomisaro
Liga Redaktoro.

Kie restas la Jarlibro 1932 ?

Jen demando, kiun ni ricevas ĉiutage, kio pruvas kiom ŝatata estas tiu ĉi eldonaĵo. Vere en tiu ĉi jaro ĝi ankoraŭ — ne eliris, pro kio ni petas sincere vian senkulpigon. Sed estas ankaŭ kialoj por tiu ĉi malfruiĝo kaj ni klarigas ilin.

1. Dum aŭtuno 1931, kiam ni starigis agadplanon, diskutis budĝeton kun la respondecaj personoj, fiksis ciferojn, ni dubis rajte pri la bona marŝo de la aferoj. Ankoraŭ ne anonciĝis ĉiuj malbonaĵoj, sed ni devis esti singardemaj. Ni do agis prudente, ankoraŭ ne mendis la Jarlibron por 1932 atendante « *signojn* » kiuj montru al ni nian sintenadon.

La kompilinto de l' jarlibro sekve komencis tiun ĉi laboron nur dum Decembro 1931, meze de multaj laboroj. Tio estas jam perdo de du monatoj.

2. Alia kaŭzo de la prokrasto estas en la libro mem. Vi scias, ke ni konservas gravan parton de la jarlibro, kiu poste nur estas kompletigita. Tiu ĉi kompletigo estas proksimume 40 %, sekve la konservado de antaŭa kompostaĵo utilas kaj valoras ankaŭ pro la prezo. Sed jen. La literoj de la antaŭa jarlibro, do de 1931, pro la parte jam trifoja preso je dekmil ekzempleroj eluziĝis tro multe. Ni devis rekompostigi la tuton, kio signifas ankaŭ du monatojn pli da tempo.

Konkludo : La Jarlibro aperos dum Julio kaj kontentigos vin.

H. J.

Internacia Cseh-Instituto de Esperanto
Oostduinlaan 32, Den Haag.

La instituto invitas por la Xa Internacia Kurso de Andre Cseh, okazonta en Arnhem 19-20 Julio.

Ĝi organizas plie Seminarion por Cseh-metodaj kursoj, ankaŭ en Arnhem, de l' 8-13a de Aŭgusto. Poste okazas internacia perfektiga kurso. de la 15-20-a de Aŭgusto.

Pri ĉiuj detaloj, kotizoj k.t.p. sin turni rekte al la instituto, laŭ supra adreso.

Karavanoj al Parizo

La sennombraj komplikajoj por vojaĝi al eksterlando favorigas la sistemon de karavana vojaĝado. Ĝis nun organiziĝas karavanoj de Nederlando (organizita de S-ro Jakob Telling, 36 Bellevojsstr. Rotterdam), de Svislando (UEA, 1 Tour de l'Ile, Genève) kaj de Germanujo. Tiuj de Germanujo estas sub la sperta gvido de Friedrich Ellersiek, la esperantista karavanestro. El la ĵus ricevita Germana Esperantisto, ni vidas ke povas partopreni tiun ĉi karavanon precipe personoj, kiuj devas por tiel diri « *turni la moneron, antaŭ elspezi ĝin* ». La vojaĝo per Ellersieka karavano havigas ankoraŭ tiun ĉi favoron, ke la drakonaj reguloj pri kunporto de mono estas kolektive plenumataj, sen malhelpo ĉe la landlimo por la kongresano. Do uzu tiun ĉi avantaĝon kaj partoprenu la kongreson. Informojn petu de Friedrich Ellersiek, Wilmsstr. 5, Berlin S.W. 61.

LA
MEMORON PLIFORTIGAS
laŭ metodo trifoje premiita de la Pariza Akademio. Profesoro de mnemoniko
D. FAJNŜTEJN, VILNO, Zawalna 15 /Polujo/.
Por anoj de U.E.A. speciala rabato. Postulu senpage prospektojn de la memorfortiga kurso en Esperanto.

Niaj mortintoj

Kun sincera bedaŭro ni ricevis informon pri la morto de jenaj samideanoj. Al la familioj ni sendas la esprimon de niaj respektplenaj kondolencoj.

S-ro Lemuel S. Ware, 72 jara, D de UEA en Camden N.J., Usono, konvinkita samideano, 11.3.32.

S-ro Hermann Stahlberg, pioniro de Esperanto en Estonio, 1892, verkinto de unua lernolibro por estonoj, fervora kaj senlaca propagandisto, 21.3.32 en Rakvere.

S-ro Richard Carter, 83 jara, fidela malnova samideano, de 1906 pioniro en Anglujo, Vancouver, Usono, Sudafriko, 9.5.32 en Liverpool. Dumviva ano de UEA 189.

S-ro Viktor Kasmader, Diplom-inĝeniero 26 jara en Paris je tifo, aŭstria samideano el Vieno. Fervora pacifisto. kunorganizinto de la grandioza porpoca manifestacio en Vieno dum la 16a kongreso, entuziasma ano de UEA. (Laŭ R. M. Frey.)

S-ro Juan Zugazaga, D en Galdacano, Baska urbo en Hispanujo. (Laŭ Espero Katolika.)

S-ro Rudolf Ott, inĝeniero, eks-ano de UEA 32113 en Kiel (sen plia detalo).

S-ino Marcelle Tiard, 71 jaraĝa, ĉiam vigla kaj fervora samideanino en Parizo, DM de UEA, 1.6.32, sekve de operacio pro apendicito.

En venonta numero aperos kelkaj informoj pri la mortintino. S-ino Tiard estis unu el la malmultaj esperantistoj kiuj seninterrompe partoprenis ĉiujn kongresojn. (E. M.)

Sinceran kunsenton !

Korespondado

Interŝanĝo de objektoj

Mallongigoj: L-letero; PK-poŝtkarto; PI-poŝtkarto ilustr.; bfl.-poŝtmarko sur bildflanko ; Gaz.-gazeto ; k.ĉ.l.-kun ĉiuj landoj C.r.-certe respondos.

Albareda (Kanariaj Insuloj). — S-ro Enrique Plácido Gallardo, 256 Puerto de la Luz, Grand Canaria, PM k.ĉ.l. korespondas Esperante, angle, Hispane kaj France.

Bahia Blanca (Argentina). — S-ro Ezequiel Pedrosa, Str. 8 esq. 11, (Tiro Federal) P.M. (hispaňaj kaj amerikaj).

Bahia Blanca (Argentina). — S-ro Andrés Verniére, Str. Berutti, 70. — P.M., nur amerikaj.

Brandys nad Labem (Ĉeĥoslov.). — F-ino Amálka Krížová ĉe firmo Melichar-Umrath k.ĉ.l. pri ĉiuj temoj. PM, PI, bfl, ilustr. porvirinaj gaz. Ĉiam tuj respondas.

Braŝov (Ruman.). — S-ro D-ro Robert Fanta, Str. Brutaril 3, L., kun intelektaj riĉulinoj memstaraj pri literaturo speciale Esperanta.

Brüx (Ĉeĥoslovakio). — S-ro Josef Beller, Del. de UEA, Teplitzerstrasse 37, PM laŭ mankolisto.

Burgas (Bulgar). — S-ro Paoun Fandikoff, bankoficisto, Banque Nationale, PM kun seriozaj filatelistoj del' tuta mondo. C. r.

Como (Italujo). — S-ro Castiglioni, Esperanto, Via Vittorio Emanuele 28, PM kun Svislando kaj Sovetunio, katalogo Yvert. Ne sendas unue. Respondo garantiata, sed nur al tiuj landoj.

Eisgrub (Ĉeĥoslov.). — S-ro Lambert Luniaczek, D de UEA, Höhere Obst und Gartenbauschule, Fotoj, L., PI., k.ĉ.l.

Elmira (U.S.A. New York). — S-ro E. B. Billings, Jr., 351 N. Main St. PI (se eble de pontoj), naciaj flagetoj (sendas unue).

Elmira (N. Y., U.S.A.). — S-ro Anthony Billard, 333 E. Water St. L., PI., koresp. Esp. Itale. K.ĉ.l.

Harburg-Wilhelmsburg (German.). — S-ro W. Rusch, Auguststr. 11, L., PI., PM kvanto kontraŭ kvanto. C. r.

Klecany 85 *u Prahy* (Ĉeĥoslov.). — S-ro Antonin Havlik, PM Ĉeĥoslovakajn tutajn seriojn kontraŭ PM de ĉiuj landoj.

Kobe (Japan). — S-ro Fumio Haraki, Kobe Shodai, Fukiai Ku, universitata studento, L., Pk, kun studentoj ĉ.l. C.r.

Liberec (Ĉeĥoslov.). — S-ro Rudolf Hanzlik, na Rybničku 5, PK., L.. kun foto : amatoroj kaj naturamikoj en Suda Eŭropo, Afriko, Aŭstralio, Azio kaj Ameriko. Sendu registrite. C. r.

Litomyŝl (Ĉeĥoslov.). — S-ro Ant. Píĉ, urba oficisto. Del. UEA, No 63. PI, L. k.ĉ.l. Ĉiam respondas.

Litomyŝl (Ĉeĥoslov.). — S-ro Frant. Svoboda, asekurejestro No 204. PI (pref. fotoajoj) bfl. naturbelajo, turismo, k.ĉ.l. akurate respondas.

Melo (Uruguay). — S-ro Emilio Martinez, str. F. Sanchez. 683. PI, L. Nepre respondas.

Montevideo (Uruguay). — S-ro Rodolfo Garcia, str. Colonia, 1300. PI, L.

Montevideo (Uruguay). — S-ro Alberto de Biagi, str. Vasquez, 1038. PI, L.

Montevideo (Uruguay). — S-ro James Schnoerr, Str. A. Lamas Nr. 3, esq. San Martin. PI, L.

Nachod (Ĉeĥoslov.). — S-ro Vladimir Cizek, Palackeho trida 30. PI., prefere el Francujo, Britujo, Azio, do ne PM.

Narva (Estonio). — F-ino S. Roosipuu, Heinaturg 3, juna estonino el Nordlando, L., PK., k.ĉ.l.

Nueva Helvecia (Uruguay). — S-ro Alfredo Wohlvend. « Colonia ». PI, L.

Orléans (Francujo). — S-ro V. Delzenne, kemi-inĝeniero 17, rue de Recouvrance, L., PK., germane kaj france kun germana socialisto.

Paso de los Toros (Uruguay). — F-ino Dimas Neves, « Rio Negro ». PI, L.

Plzen (Ĉeĥoslov.). — F-ino Sophie Cipera, Zizkova 52, informas pri sia nuna kaj konstanta adreso.

Potŝtejn (Ĉ.S.R.). — S-ro Inĝ. L. Berger, kolektas adresojn por sia BES. Adresaro de Esperantistoj, el ĉiuj landoj.

Praha (Ĉeĥoslov.). — S-ro Karel Oppenheimer, II., Denisovo Nádr., PM. ĝis 1920 eldonita laŭ Senf k.ĉ.l.

Prerov (Ĉeĥoslov.). — Kleriga rondeto de SOKOL, pri korpeduko kaj sporto kun gimnastikistoj en la tuta mondo.

Rivera (Uruguay). — S-ro Mario Prestinari « Saladero Sao Paulo ». PI, L.

Seattle (U.S.A., Wash.). — S-ro W. Adams, 214 University Street, PK., L., por lernantoj de sia klaso.

Stockholm (Svedio). — S-ro C. H. Pettersson, Skanegatan 46, II, t. v. L. PI, k.ĉ.l.

Petoj kaj Proponoj

INTERNACIA KOMERCO

Adresaro. — BES-Adresaro de Esperantistoj el ĉiuj landoj aperis. Prezo : Unu ekz. 1.— Frk. svisa. — Mendu ĉe : E-Eldonejo, BES, Potŝtejn, Ĉeĥoslov.

Filatelistoj! Mi aĉetos aŭ interŝanĝos kromajn poŝtmarkojn Kontraŭ kovertoj aerpoŝtaj. Bonstataj belbildajoj preferataj penindkvante. Malbonstatajoj kaj bagatelajoj ne dezirataj. Mi aĉetos, vendos aŭ interŝanĝos. Ano Asocio de Filatelistaj Amerikanoj. Frank Herget, 553 Suffolk St., Buffalo, N. Y.

Katolikismo. — Ne-katolikoj kiuj deziras informojn pri la katolika diservo povos ricevi ilin senpage de unu el katolikaj informoficejoj en Nederlando pere de l'korespondanto M. Goosens. Noblestraat 10, Brielle, Nederlando.

Komercistoj atentu. — Fabrikejo taŭga por fabrikado de artefarita silko aĉetebla. Senpaga liverado de akvo. Sin turni al D-ro John B. Primmer, Delegito de UEA, Cowdenbeath, Skotlando.

Libertempo. — Fakinstruisto por germana lingvo, literaturo, geografio, historio, ĉe austria ŝtata ĉeflernejo, sperta en moderna instruo kaj edukado, ŝtate ekz. Esperanto instruisto, partopreninto de la Internacia Esperanto-kurso por Pedagogoj de la Cseh-Instituto en Arnhem, 34 jara, vidvo, dum la libertempo 5.7. ĝis 15.9. volente estus preta okupi sin kun infanoj de familio aŭ feria kolonio, kiu invitas lin kiel gasto. Atestoj, foto al dispono. Pero rekompencata. Proponoj al s-ro Watzinger Franz, fakinstruisto, Delegito de UEA, Widmanngasse, 27, Villach, Austrio.

Pensiono. — Distinga familio akceptas pensianojn. Fluanta akvo, varma kaj malvarma, centra hejtado, ĝardeno. Modera prezo. — Situita kontraŭ la liceo Michelet. — S-ino du Sablon, 14 bis Avenue Victor-Hugo, Vanves, Paris.

Libroj eĉ pli malmultekostoj

Nia eldonejo refoje grave reduktis la prezojn. Bonvolu kompari la unuajn prezojn kun tiuj antaŭ la 1-a de oktobro 1931.

Prezoj en germanaj Markoj.

	Nuna	antaŭa
Albanio	0.20	0.25
Baghy. **Printempo en la aŭtuno.**	1.60	2.—
Bialystok, gvidlibreto	0.20	0.25
Blicher (Bulthuis). **Taglibro**	0.40	0.50
Bukedo I, Bukedo II, po	0.40	0.50
Bulthuis. **Jozef kaj la edzino de Potifar**	2.80	3.20
bind.	4.40	4.80
Bulthuis. **Malriĉa en spirito**	0.40	0.50
Butin. **Faŭsto,** komentario	0.20	0.25
Dormanns. **Handbuch des Esperanto**	2.40	3.—
bind.	4.—	4.50
Engholm. **Al Torento**	1.20	1.50
Grimm. **Du fabeloj**	0.25	0.30
Haefker. **Jarmiloj pasas,** du volumoj	14.—	16.—
en unu volumo.	12.—	13.50
Hohlov. **La tajdo**	0.80	1.20
Ilustrita Biblioteko, ĉiu numero.	0.40	0.50
kvin numeroj	1.60	2.—
kvin numeroj bind.	3.—	3.60
Isac. **Sonorilo kaj kanono**	1.—	1.20
Jung. **La Alta Kanto de la Amo.**	0.60	0.80
Jung. **Landoj de l' Fantazio**	2.80	3.20
bind.	4.40	4.80
Jung kaj Wingen. **Das leichte Esperanto**	1.—	1.—
Kalendaro por 1932	1.50	—

	Nuna prezo:	antaŭa prezo:
Kloepffer. **Vagabondo kaj sinjorino**	2.80	—
bind.	4.40	—
La Maro	3.—	3.60
Maxwell. **Anstataŭa edzino**	2.80	3.20
bind.	4.40	4.80
Oberrotman kaj Jung. **La lastaj tagoj de D-ro L. L. Zamenhof**	1.—	1.20
Oriento	3.—	3.60
Remarque. **En okcidento nenio nova**	4.50	5.—
bind.	6.30	7.—
Remarque. **La vojo returne**	5.—	6.—
bind.	7.—	8.50
Robinson. **Se grenereto**	2.50	—
bind.	4.—	6.—
Rieck. **Oni ridas**	0.40	0.50
Scott. **Filatela Terminaro**	0.60	0.80
Storm. **Du majstronoveloj**	2.—	2.40
bind.	3.50	4.—
Toller. **La hirundlibro**	2.15	2.40
Tolstoj. **Aelita**	2.40	3.20
bind.	4.—	4.80
Tolstoj. **La morto de Danton**	1.—	1.60
Trarbach. **Teknika vortareto**	0.30	0.35
Trőgel. **Esperanto kaj kulturo**	0.60	0.80
Wiesenfeld. **Galerio de Zamenhofoj**	0.60	1.—

Al la prezoj aldonu 10% por sendkostoj.

Librofako de Heroldo de Esperanto, Brüsselerstr. 94, Köln, Germanlando.

DE ORIENTO ĜIS OKCIDENTO

devenas la altvaloraj raportoj kaj artikoloj en la nova numero (Majo-Junio) de

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Jarabono de IPR nur 1 Usonan dolaron aŭ egalvaloron. Specimenan numeron petu kontraŭ du respondkuponoj de la administranto:

Kurt Hofmann, Felgenhauerstr. 63,
RIESA (Germ.)

Esperantista vivo

Naskiĝoj.

*** Al gesinjoroj D-ro Kamaryt, Komitatano kaj Delegito de UEA, prezidanto de Ĉehoslovaka Asocio Esperantista naskiĝis filo nomita Pavel Stanislav.

*** Al Ge-sroj F. P. Huber, MS de UEA en Köln, Mülheim kaj Aberdeen, filo Erich.

*** Al Ge-sroj Emil Zuberbühler-Müller, D en Nesslaŭ, Svis., filo Emil, 29.5.32.

Edziĝoj.

*** S-ro Franz Tischer, Ano de UEA 21206 en Aussig a.d. Elbe, Ĉehoslov., kun F-ino Erna Richter.

Klavarskribo



La Nova Muzikskribo

kiun ĉiu povas legi. Neniaj diesoj, neniaj bemoloj, nek kleoj. Ideala muzikskribo por laikoj kaj virtuozoj.

Nun ĉiu povas ludi : « Esperantaj Kantoj »
(PIANO)

Prezo : Fl. 0,75 (nederl. guldeno); R.M. 1,20; frs. fr. 8.—; frs. s. 1.50; £ 1/8. *Enhavo:* La Espero, La Tagiĝo, Al la Esperantistaro, La Verda Stelo.

« La Komencpaŝoj (piano aŭ orgeno), Fl. 1.—; R.M. 1,65; frs. fr. 9.80; frs. s. 2.—; £ 2/1. — Oni povas korespondi en Esperanto. Tre multaj muzikaĵoj haveblaj. Mendu per poŝtgiro (Nederlando 179848. — Parizo 165685. — Berlino 130219), per poŝtmandato, aŭ per letero.

MUZIKINSTRUISTOJ ! Ne plu embarasu viajn lernantojn pro legmalfacilaĵoj. Precipe ne en la komenco. Klavarskribo estas tiel logika kaj memkompreniganta ke apenaŭ tempon devas esti dediĉita por lerni la legadon. — Skribitaj informoj senpage. Ni turnigos demandojn pri lecionoj per Klavarskribo al via adreso.

Klavarskribo A. K. SLIKKERVEER, Nederlando

L'IMPRIMEUR-GÉRANT : A. GRANCHAMP, 2, RUE DES USINES, ANNEMASSE. — 373-6-32